

V-4252/76 (1983)

1983 januaro

76a jaro *Esperanto*


n-ro 925 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Ĉefrolo por Budapeŝto en 1983

Vi trovos,

ke post tiom da atendado, fine, nur nun — profunde en februaro — venas al vi la januara revunumero, kun neniel intencita rekordo de malfruo. Nu, kion fari, kiam la gripo neinvitite komencas miksiĝi en la redaktan politikon? Krome, foliumu iom la numeron kaj vi konstatos, ke tio ĉi aspekte pli-malpli ne estas la revuo, kiun vi kutimis ricevi en la lastaj naŭ jaroj. Vi verŝajne rapide konsentos, ke la revuo nun estas pli bela. Ni faros ĉiun nian eblon, por ke ĝi denove fariĝu ankaŭ rapida kaj akurata. Ĝis baldaŭ!

Enhavo

- 01 Centjara jubileo de Esperanto: La jubilea agado komenciĝis (Renato Corsetti)
- 02 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: Nia Asocio fariĝas 75-jara en 1983 (Grégoire Maertens)
- 03 Interkomputo '82: Pli ol ducent fakuloj partoprenis la Simpozion (Péter Broczkó); Danlando: Unua libro pri la Jubileo; Pakistano: Televida informado; "Prelegaro de Interkomputo '82"
- 05 Soveta Unio: Centmiloj da libroj por amasa informado (sm); Teatro: Denove festivalo en Budapeŝto
- 06 Konferenco de CED en Nov-Jorko: Potenca ĉeestantaro
- 07 Zamenhofa Tago en Nov-Jorko
- 08 Seminario pri faka agado: Provo ordigi kaj sistemigi la fakan laboron
- 10 Forpasis Rolf Bugge-Paulsen (C. Støp-Bowitz); Landa agado: Kvar raportoj el Irano
- 11 Recenzoj: "Lappar, la antikristo" de Endre Tóth (C. Conterno); "Strangled Cries" de Julius Balbin (L.H. Knoedt); "Guido Gezelle" red. Bert Peleman (A. Goodheir); "La naŭa kanalo" de István Nemere (D.K. Jordan); "Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof" de Ludovikito (G. Berveling); "La landa vekhorloĝo" kaj "Tridek roluloj" de Stefan MacGill (W. Pilger); "Angoro" de Karolo Piĉ (L.H. Knoedt)
- 14 Laste aperis... (novaj eldonadoj en/pri la I.L.)
- 15 Kongresa komunikado (novajoj pri la 68a UK)
- 16 TEJO-paĝo: Tamen al Debrecen! (Roberto Haddon); Speciala kotizo por gejunuloj en la 68a UK
- 17 Loke-Fake-Persone (mallongaj novaĵoj)
- 19 Oficiala Informilo de la Centra Oficejo de UEA

La kovrilo

Urboj, dise tra la mondo, fieras pri diversaj trajtoj de sia aspekto: Amsterdamo kaj Venecio pri siaj kanaloj, Rio pri rava geografia situo, Moskvo pri la subtera fervojo, Sidnejo pri la operejo, Parizo pri sia rivero, Londono pri la horloĝturo, Kairo pri la moskeoj, Romo pri la romiaĵoj, Nov-Jorko pri... vi scias — la nubskrapuloj, ktp. ktp. Budapeŝto fieras pri siaj pontoj. Ili en la urbo de la 68a UK estas multaj kaj aparte belaj. Tial unu el ili sur nia kovrilo, dank' al la fotisto Zoltán Fejér. Krome, unu el la kialoj pro kiuj ni elektis la pontan bildon estas — kompreneble — ankaŭ tiu al vi bone konata fakto, ke ni ĉi-jare al la hungara ĉefurbo kondukos milojn da alispecaj pontofarantoj, kiel ni almenaŭ por ĉi tiu okazo povus nomi la esperantistojn kaj ilian klopodon transponti la komunikajn abismojn de la nuntempo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvivilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

La jubilea agado komenciĝis

Ĉi tiu artikolo povus komenciĝi en pluraj manieroj. Ĝi povus ekiri de la banala konstato pri la paso de la tempo, de la jaro 1887 ĝis nun, kaj pri la neceso festi nian unuan jarcenton da luktoj kaj sukcesoj. Ĝi povus retorike ekiri de la signifo de jubileoj por la antikvuloj, kaj ĵongle ligi la originan ideon pri liberigo de sklavoj ĉiun kvindekan jaron kun la eco de Esperanto, kiu celas liberigi homojn el lingvaj sklavecoj. Ĝi povus burokrate ekiri de la aprobo fare de la koncernaj instancoj de kvinjara plano por festi la Jubileon de Esperanto en 1987, kaj pedante atentigi pri la ĵusa komenciĝo de tiu kvinjara periodo.

Kiel ajn, temus pri senutila fortostreĉo, ĉar por la legantoj de ĉi tiu revuo — kaj pli ĝenerale por preskaŭ ĉiuj esperantistoj — jam estas konate, ke ĉiuj agantaj fortoj en la Movado, kaj tute aparte en UEA, mobiliziĝadis dum la lastaj jaroj por alfronti grandan, fortostreĉan sed samtempe ĝojigan taskon — prifesti: la Centjaran Jubileon de la Internacia Lingvo.

Kion oni jam faris

Dum la lastaj du-tri jaroj, komisionoj, komitatoj kaj seminarioj ellaboris kvinjaran planon, kiu kovras la periodon de 1983 ĝis 1987 kaj grandtrajte montras la agadojn farindajn por alveni al kulmina festado de la Jubileo en 1987 en ĉiuj landoj de la mondo, kie esperantistoj ekzistas.

Ĝi ampleksas plurajn sekciojn kaj ĝi antaŭvidas taskojn por ĉiuj, de akademianoj, kiuj povos elverŝi sian saĝon en novajn verkojn eldonotajn en jubileaj serioj, tra organizistoj, kiuj povos ekzerci siajn kapablojn, organizante amason da diversspecaj kunvenoj, al lokaj klubanoj, kiuj finfine havos ion en la manoj por pli efike dissemi informojn pri la lingvo en sia loĝloko. Tiu plano estis sendita al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kaj ili estis instigitaj agi laŭ ĝi. La reagoj al la unuaj instigoj estas pli ol kuraĝigaj. Ili estas klara pruvo pri la vivanteco kaj la vigleco de nia Movado.

Mi timas menciigi kelkajn el la jam entreprenitaj agadoj pro la certeco ofendi preterlasitojn. Krome, oni bezonus duonon de ĉi tiu revuo por listigi ĉion jam entreprenitan de niaj landaj asocioj. Ekzemple, tamen, mi nur diru, ke la bulgara asocio — la mamuta

— reagis kun kapreola svingo, ellaboris sian propran planon, starigis sian propran enlandan patronan komitaton por la jubilea festado, kun dekoj da famaj neesperantistoj, ktp. Same faris la malta — unu el la plej malgrandaj — kaj deko da aliaj, inter kiuj mi devas menciigi la danan, pro ĝia klara programo, kiu multe emfazas rilatojn kun neesperantistoj kaj kun danaj lingvistaj medioj.

Intertempe la Estraro de UEA starigis oficejon por prizorgi la lavangon da paperoj, kiuj akumuliĝos dum ĉi tiuj jaroj. Nuntempe ĝi estas en Antverpeno, ĉe la Grafika Centro de UEA, kaj ĝin prizorgas juna belga esperantisto, André Staes. UEA lanĉis ankaŭ konkursojn por jubileaj simbolo kaj afiŝo. La multnombraj reagoj al la konkursalvokoj estas plia pruvo pri la ideoriĉo de nia komunumo. (Vidu apartan tekston pri la du konkursoj en ĉi tiu revunumero.)

Kompreneble, ne mankis kontaktoj kun UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Unesko jam reagis favore kaj promesis kunfari ion. Internacia Telekomunika Unio (ITU), kun kiu estis pli oftaj rilatoj pro la temo de la komenca jaro de la jubilea periodo (1983 estas la Monda Komunika Jaro), reagis tre favore, kaj kunlaboro espereble intensiĝos dum ĉi tiu jaro. Ĉiukaze ni jam estas tre kontentaj pro tio, ke ITU delegis sian sekcistron pri komputotekniko, s-ron I. Uygur, partopreni en INTERKOMPUTO (en Budapeŝto), kiu estis samtempe seminario pri komputilscienco kaj formala komencopunkto de niaj agadoj en la kadro de la Monda Komunika Jaro.

Kion oni volas fari

Esence, ni volas festi en 1987 la Jubileon de la Internacia Lingvo per serio da agadoj, kiuj estos samtempe ĝojaj renkontiĝoj de la Esperanta komunumo kaj atentigoj por la ekstera publiko pri tio, kion ni atingis dum la unua jarcento, kaj pri tio, kion ni planas atingi dum la dua. En ĉi tiu senco la prijubileaj agadoj ne estos nur kunvenoj de eksbatalantoj pri sia glora pasinteco sed ankaŭ — kaj ĉefe — pretigaj kunvenoj por difini niajn estontajn celojn kaj plani la atingomanierojn.

Dum la venontaj kelkaj jaroj, de nun ĝis 1986, ĉiu devos partopreni en agadoj, kiuj celas plifirmigi la bazon de nia komunumo per pligrandigo de la nombro de uzantoj de la Internacia Lingvo. Tio povos esti atingita nur pere de pli bone kunordigitaj streboj sur la kampoj de informado kaj instruado.

En 1987 "eksplodos" la informado al la ekstera mondo kaj la festado. Kontaktoj jam estas ligitaj kun la

La Estraro, la Centra Oficejo kaj la redakcio de la revuo plej kore dankas pro la multaj novjaraj bondeziroj, kiujn ili sincere reciprokas.

organizantoj de la jubilea kongreso — tre verŝajne ĝi okazos en la lando mem, kie Esperanto naskiĝis antaŭ cent jaroj — kaj de jubileaj festivaloj, unu en ĉiu kontinento. Aldone, kompreneble, okazos jubileaj aranĝoj en ĉiu aparta lando kaj fakaj renkontiĝoj kun partopreno de neesperantistoj, inter kiuj la plej prestiĝa devus okazi komence de la jaro en la sidejo de Unesko, en Parizo. Ĝin kunorganizos UEA, Unesko kaj la francaj esperantistoj.

Broŝuro, kun ĉiuj detaloj pri la jubilea agadplano kaj kun multaj indikoj pri eblaj agadoj je ĉiu nivelo, estas jam pretaj kaj haveblaj de UEA. Se vi taksas vin aktivulo, vi ne povas ne peti ĝin kaj ne plenumi vian parton en ĉi tiu komuna entrepreno, kiu ĵus komenciĝis. Tiu broŝuro klarigas — multe pli bone ol ĉi tiu artikolo — la celojn de la Jubileo kaj la manierojn por atingi ilin.

La karaktero mem de la jubilea festado kongruas kun komuna kunlaboro de ĉiuj anoj de la vasta esper-

antlingva komunumo trans ĉiuj organizaj limoj. Kvankam UEA intencas mem realigi kiel eble plej komplete la programon supre menciitan, ĝi esperas, ke ankaŭ ĉiuj aliaj poresperantaj, peresperantaj, priesperantaj kaj duonesperantaj organizaĵoj partoprenos, ĉiu laŭ siaj ebloj kaj interesoj, en la komuna laborado kaj festado. Tiucele oni jam instigis ĉiujn konatajn organizaĵojn ekstarigi siajn proprajn planojn kaj interŝanĝi informojn en forumo tiucele nun kreata.

Kiam ĉi tiu numero de la revuo de UEA estos en viaj manoj, la jubilea periodo estos jam komenciĝinta. Ĉi tiu artikolo volas nur marki tiun momenton. Ĝi ankoraŭ ne estas momento solena, sed ĝi portos nin ĉiujn al solenaĵoj en inda maniero, nur se ni ĉiuj ekde nun energie kunagos laŭ la akceptita kvinjara laborprogramo. Ne plu restas multa tempo por diskuti pri la programo, estas tempo ekplenumi ĝin.

Renato Corsetti

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA:

Nia Asocio fariĝas 75-jara en 1983

En aprilo ĉi-jare kompletiĝos tri kvaronoj de jarcento de post la fondiĝo de Universala Esperanto-Asocio en 1908. Kvankam ni ankoraŭ plurfoje revenos al tiu jubileo tra la jaro, mi volas nun elstarigi du elementojn el la 75-jara historio de UEA, kiuj estas eĉ pli aĝaj ol la Asocio mem.

„Kiom brila ideo estas tiu delegita sistemo!”, skribis Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA, en sia antaŭparolo por la Jarlibro 1982. Efektive, tiu brila ideo troviĝis en la koncepto de nia Asocio jam antaŭ 75 jaroj, kaj ĝi ankoraŭ nun, en 1983, funkcias kiel unu el la bazaj strukturoj de UEA.

Kiam en 1908 Hector Hodler, la fondinto de UEA, volis realigi sian revon pri starigo de granda unueca internacia organizaĵo, li bone konsciis, ke tiu nova tutmonda asocio devas transpreni kaj kunigi la du jam ekzistantajn elementojn: la revuon *Esperanto* de Paul Berthelot kaj la reton de pli ol ducent ”konsuloj” (delegitoj), kiuj jam funkciis konforme al la ideoj de Alphonse Carles (fondinto de la Esperanto-grupo en Béziers, Francio), kaj ”oficejoj” iniciatitaj de Théophile Rousseau (el Bourg, Francio). Per la omaĝo al tiuj du francoj, kiujn ni nun memoras okaze de la 75-jara jubileo de UEA, ni volas emfazi la kontinuecon de nia Asocio, kiu fidele flegas ĉiujn gravajn iniciatojn tra la tuta periodo de sia 75-jara disvolviĝo.

La Jarlibro de UEA ankaŭ jubileas ĉi-jare (la unua aperis en 1908). Ĝia lasta eldono, tiu por 1982, listigas nun 3 579 delegitecojn, por kiuj la difino ankoraŭ restas tiu el 1908: sensalajra ofico, kiun la

delegito akceptas por utili al Esperanto kaj al la Esperanto-parolantoj.

En nia Movado neniuj cetere dubas, ke tiu dekomenca idealismo kaj ĉiama solidareco kaj preteco de la Esperanto-parolantoj por subteni la disvastigon de Esperanto kaj de nia Asocio restis sama tra la pasintaj 75 jaroj. Tamen, nun komence de 1983 ni sentas, ke eksteraj, ne-movadaj faktoroj minacas negative influi la vastigon de nia Delegita Reto same kiel la ceteran vivon de la Asocio. Nun fine ankaŭ la Movado komencas sperti la sekvojn de tutmonda ekonomia krizo, kiun la homaro travivas jam de kelkaj jaroj. Kompreneble, ke ankaŭ nian Asocion trafas la sekvoj de senlaboreco kaj inflacio en tiu aŭ alia lando, la transpagaj problemoj de tuta aro da landoj, politika malstabileco en diversaj mondopartoj ktp. Se ĉiuj ĉi problemoj reflektiĝas en la vivo de UEA kun kelkjara malfruo, tio estas ankoraŭ unu pruvo pri la potenco de tiu movada solidareco, kiun ni ĝuas tra la tuta historio de UEA. Ni jam spertis kaj certe denove spertos, ke, kiam el unu lando ne plu eblas transpagi kotizojn, tiam la esperantistaro de aliaj landoj pretas helpi kaj faras tion pere de niaj diversaj fondaĵoj.

Ni do ne permesu, ke en 1983 diversaj ekstermovadaj obstakloj bloku tiun mirindan kaj tradician solidarecon de ĉiuj Esperanto-parolantoj en la unueca UEA. Tiamaniere ni ne nur venkos la sekvojn de la ekonomia krizo sed ni ankaŭ plej konvene omaĝos la ideojn, kiuj inspiris kaj instigis Carles, Rousseau kaj Hodler al la fondo de la jubileanta UEA.

Grégoire Maertens

Pli ol ducent fakuloj partoprenis la Simpozion

Post tre fundaj preparoj, de la 27a ĝis la 30a de decembro 1982, en Budapeŝto okazis INTERKOMPUTO '82 — Internacia Komputosciencia Simpozio kaj Ekspozicio. La komputistoj venis amase al Budapeŝto: partoprenis pli ol ducent fakuloj el 19 landoj de tri kontinentoj. Kompreneble, temis pri dekoj da hungaroj, sed oni rimarkis ankaŭ tre fortan reprezentigon de So-

Unio), Helmar Frank (FR Germanio) kaj Ottó Haszpra (Hungario).

La Simpozio laboris tri tagojn en dek sekcioj kaj aŭdis 103 fakajn prelegojn. Kiel supozeble, paralele okazis pluraj (ofte 4 aŭ 5) sekcikunsidoj. La dek sekcioj traktis jenajn temojn:

- Teorio kaj praktiko de la programado (prezidis H. Frank, FR Germanio);
- Matematiko (F. Lo Jacomo, Francio);
- Lingvoscienco (Grigorij Cejtin, Soveta Unio);
- Instruado (F. Pennacchietti, Italio);
- Aplikoj en industrio (V. Nemec, Ĉeĥoslovakio);
- Mikrokomputiloj (J. Osburn, Jordanio);
- Agrikulturo (J.O. de Kat, Nederlando);
- Medicino, psikologio (S. Lehr, FR Germanio);
- Terminologio (T. Watts, Britio);
- Administrado (F. Pennacchietti, Italio).

La Simpozio finiĝis per plenkunsido, dum kiu la prezidantoj de la sekcioj raportis — plejparte favore — pri la faritaj laboroj.

Interesan kaj utilan fonon al la Simpozio donis komputilteknika ekspozicio, aranĝita en la konferencujo mem. Partoprenis ĝin pli ol dudek firmaoj. La plej fascina trajto de la ekspozicio sendube estis rekta kontakto kun la komputilo de la Universitato de Michigan en Usono. Multaj partoprenantoj testis la plej malmultekostan hungaran komputilon, kiu estis ankaŭ la ĉefpremio en Esperanto-konkurso pri programado por mezlernejoj, okazinta dum la Simpozio.

Fine de la aranĝo, multaj partoprenantoj estis petitaj esprimi sian opinion pri la plej sukcesa trajto de la Simpozio. Pluraj konsentis, ke tio estis la fakto, ke jam antaŭ la Sim-

pozio aperis ses volumoj de entute ĉ. 1 200 paĝoj da simpoziaj prelegoj (vidu la bibliografiajn detalojn sur p. 4). Tiuj 96 prelegoj aperis ankaŭ en la formo de mikrofilma slipo. Aparta 40-paĝa programkajero enhavis ĉiujn detalojn pri la Simpozio kaj Ekspozicio. La hungara poŝto eldonis specialan poŝtkarton pri la aranĝo, kaj la gazetaro, televido kaj radio abunde raportis pri la Simpozio.

INTERKOMPUTO '82 sendube estis unu el la plej amasaj kaj plej sukcesaj fakaj kunvenoj ĝis nun realigitaj en la Esperanto-movado. Tia aranĝo povis esti realigita per intensa kunlaboro kun nemovadaj instancoj.

Oni planas, ke la aranĝo fariĝu tradicia kaj okazu ĉiun duan jaron; sekvos do INTERKOMPUTO '84.

D-ro Péter Borczkó

INTERKOMPUTO '82 estis unu el la plej amasaj fakaj kunvenoj ĝis nun.

veta Unio kaj FR Germanio, plurajn prelegantojn el Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj Usono, fakulojn el Britio, Bulgario, Italio, Belgio, Germana DR, Hispanio, Francio, Nederlando, Jugoslavio, Svislando kaj Ĉinio. La Simpozio ĝuis subtenon de Unesko, ĉar temis kvazaŭ pri inaŭgura aranĝo de la Monda Komunika Jaro — 1983, kaj de Internacia Komputosciencia Societo. S-ro I. Uygur venis el Svislando por saluti nome de Internacia Telekomunika Unio.

En la solena inaŭguro de la Simpozio partoprenis ankaŭ d-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA. La solenaĵon malfermis la akademiano Tibor Vámos, nome de Komputosciencia Societo Johano Neumann, organizinto de la Simpozio. En la sama plenkunsido parolis i.a. profesoroj Grigorij Cejtin (Soveta

DANLANDO:

Unua libro por la Jubileo

Gyldendal, la plej renoma eldonejo en Danlando (fondita en 1770), la 1-an de februaro 1983 lanĉos sian novan libron: *Esperanto lingvistisk set*. Ĝi estas dana traduko, fare de Preben Bagger, de la konata studo de John C. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, eldonita en 1978 de UEA / CED. (Oni atendas eldonon ankaŭ de la germana traduko de G. Becker, kiu devus aperi ĉe Sarlanda Esperanto-Ligo.)

La dana traduko aperis kun subvencio el la Fondaĵo Margrethe Noll. Erik Hansen, profesoro pri la dana lingvo en la Universitato de Kopenhago, verkis antaŭparolon por ĉi tiu dana eldono de la libro de Wells. La eldonon prizorgis Dana Esperanto-Asocio, laŭ aparta kontrakto kun la eldonejo Gyldendal, kiu siavice distribuos la libron tra ĉiuj siaj profesiaj kanaloj.

Laŭ informo el Danlando, la studo de Wells estas la unua publika elpaŝo en la kadro de la kvinjara agadplano de la dana Jubilea Komitato okaze de la centjariĝo de Esperanto. La dua paŝo — ankaŭ en februaro 1983 — estos la distribuado de 2500 ekzempleroj de broŝuro (nun presata), speciale verkita por lingvistoj kaj politikistoj. Ĝi informos i.a. pri la libro de Wells kaj pri la parlamentaj Esperanto-grupoj, precipe tiu en Britio.

Estas menciinde, ke en la dana Jubilea Komitato, kies prezidanto estas Preben Bagger (cetere, ankaŭ komitatano de UEA), harmonie kunlaboras Dana Esperanto-Asocio, Dana Esperantista Fervojista Asocio kaj Dana Laborista Esperanto-Asocio. Ĉiuj tri organizaĵoj havos komunan kongreson, de la 18a ĝis la 20a de marto en Kopenhago, ne nur por plani la agadon por la Centjara Jubileo sed ankaŭ por komune festi 75 jarojn de Esperanto en Danlando.

PAKISTANO:

Televida informado

La 16an de decembro 1982, en la tre populara programo — "Gvan fikar" (Juna penso) — de la pakistana televido gastis Saeed Ahmad Farani, ĝenerala sekretario de Pakistana Esperanto-Asocio. Dum konvena elsendohoro, vespere, s-ro Farani parolis pri la signifo de la Internacia Lingvo kaj pri la aktiveco de la Esperanto-movado. Li aparte emfasis la laboron de Pakistana Esperanto-Asocio, kiu fondiĝis en 1978 kaj havas aktivajn grupojn en pluraj lokoj tra la lando. Esperanto-kursoj nun okazas en Multane, Murree kaj la ĉefurbo Islamabad. En Jhelum funkcias malgranda eldonejo de informaj kaj instruaj materialoj pri Esperanto. S-ro Farani jam pli frue, en junio 1980, estis intervjuita pri Esperanto en la pakistana televido.

Malgraŭ la sukcesoj, kiujn dum la lastaj jaroj notas la loka Esperanto-movado en Pakistano, ŝajnas, ke multo tie ankoraŭ okazas tro memstare kaj temporabe. Oni ankoraŭ, ekzemple, kunmetas proprajn bazajn informilojn en la angla (unu el la oficialaj lingvoj en la lando) anstataŭ peti jam pretan informan materialon, ĉu de UEA, ĉu de landaj asocioj en ekz. Britio aŭ Usono. Kunordigajn provojn ĉi-rilate faras s-ino Kazuko Kikusima (Japanio), kiu nome de UEA zorgas pri kontaktoj kun aziaj esperantistoj, precipe en la landoj kun malforta kaj nova Esperanto-movado. Por bonvolaj librodonacoj uzu jenan adreson: Pakistana Esperanto-Asocio, Azad Foqania Majidia Maktab, Near Baba Karam Shah (Darbar), Shamali Mohallah, Jhelum, Pakistano. Antaŭdankon!

Prelegaro de INTERKOMPUTO '82

Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 175 p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). 24 cm. Mimeo. ISBN 963 8431 30 6. Dek kvar prelegoj de Interkomputo '82. Prezo 18,00 gld.

Apliko de komputiloj en psikologio, medicino kaj agrikulturo. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 80 p. (plus ĉ. 20 paĝoj da anoncoj). 24 cm. Mimeo. ISBN 963 8431 25 3. Dek prelegoj de Interkomputo '82. Prezo 9,00 gld.

Homa lingvo kaj komputilo. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 132 p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). Mimeo. ISBN 963 8431 26 1. Dek du prelegoj de Interkomputo '82. Prezo: 18,00 gld.

Matematiko, instruado de matematiko kaj komputotekniko. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 172 p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). 24 cm. Mimeo. ISBN 963 8431 27 X. Dek naŭ prelegoj de Interkomputo '82. Prezo: 18,00 gld.

Mikrokomputiloj, periferioj kaj aplikoj. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 164 p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). 24 cm. Mimeo. ISBN 963 8431 28 8. Dek sep prelegoj de Interkomputo '82. Prezo: 18,00 gld.

Teoriaj kaj praktikaj problemoj de la programado. Red. I. Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 183 p. (plus ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). 24 cm. Mimeo. ISBN 963 8431 31 8. Dek ok prelegoj de Interkomputo '82. Prezo: 18,00 gld.

ATENTIGO: La ĉi-supraj volumoj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA. Pri la vendokondiĉoj vidu la finan alineon de la rubriko "Laste aperis" aliloke en ĉi tiu revunumero.

Centmiloj da libroj por amasa informado

Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) ankoraŭ ne sukcesis lanĉi sian Esperantan periodaĵon, anoncitan tuj post la fondiĝo de ASE antaŭ kvar jaroj. Nun aperas ruslingva *Informa bulteno*, kiu tamen ne estas havebla eksterlande. Tial niaj informoj pri la Esperanto-movado en Soveta Unio estas nur maloftaj kaj fragmentaj, multe malpli ol meritis la vigleco de la interesiĝo pri la Internacia Lingvo en la plej vasta lando de la mondo.

En nia julia/aŭgusta numero de 1982 (p. 122) aperis informo, ke la popularscienca revuo *Himija i fiznĵi* (Kemio kaj vivo) publikigos kurson de B. Kolker, speciale verkitan por sciencteknikaj laborantoj. Intertempe la 16 lecionoj efektive aperis, sed ni ankoraŭ ne sukcesis akiri informojn pri la rezultoj de tiu kurso en la revuo, kiu havas milionan legantaron. Krome, en kelkaj niaj numeroj fine de la pasinta jaro, aperis informoj pri pluraj Esperantaj libroj, eldonitaj lastatempe en Soveta Unio, i.a. pri la reeldono (en 100 000 ekzempleroj!) de *Esperanta-rusa vortaro* de E.A. Bokarev. Nun atingas nin du aliaj surprizoj el la pasintjara informa rikolto en Soveta Unio:

Rasskazy o jazyke (Rakontoj pri la lingvo), de V.M. Nikiteviĉ, aperis ĉe la eldonejo "Narodnaja Asveta" (Popola Klerigo) en Minsko (Belorusio). Tiu bela (abunde ilustrita, dukolore presita) 80-paĝa libro estas destinita al „pli aĝaj lernejoj”, kaj ĝi aperis en 38 000 ekzempleroj. Interese kaj populare ĝi respondas al la demandoj: Kio estas la funkcio de la lingvo? Kiam aperis la skribo? Kio estas Esperanto? ktp. La aŭtoro dediĉas 7 paĝojn al la Internacia Lingvo, kies kvalitojn li delikate prezentas kaj al kiu li entute rilatas tiel favore, ke ŝajnis necesa kvazaŭ konfeso lia, fine de la libro, jene:



Vasta informado: B. Kolker kaj la libro de Vartanjan

”Ni diris tre multajn bonajn vortojn pri Esperanto... Tiun lingvon ne malfacilas ellerni. Tre interesa povus esti lerneja studrondo pri Esperanto... La lingvo akiras ĉiam pli grandan popularecon ĉe la junularo kaj ĉiam pli kaj pli disvastiĝas tra la mondo.”

La alia nova libro estas fakte reeldono de la verko de E.A. Vartanjan — *Puteŝestvije v slovo* (Vojaĝo en vorton) —, kiu unuafoje aperis en 1975. Ĝi nun aperis ĉe la eldonejo "Prosveŝĉeniĵe" (Klerigo) en Moskvo, en eldonkvanto apenaŭ kredebla el la vidpunkto de la Esperanto-movado: 483 000 ekzempleroj. Ĉar temas pri la dua eldono, la altega eldonkvanto supozeble respondas al la populareco de la unua eldono. Cetere, ankaŭ la libro de Vartanjan portas subtitole la indikon: "Libro por lernantoj de pli altaj klasoj". El 222 paĝoj de sia libro, Vartanjan dediĉas 15 al la historio de la internacilingva ideo kaj el tio la plimulton al Esperanto, kies provleciono okupas sep paĝojn. Ankaŭ ĉi tie, kiel en la libro de Nikiteviĉ, aperas kelkaj eraretoj aŭ malĝustaĵoj pri la Internacia Lingvo, sed la tuto impresas tre favore kaj prezentas valoregan informan potencialon, direktitan al la plej interesa medio — la junularo.

Se ni al ĉio ĉi aldonas la fakton, ke ankaŭ en la soveta gazetaro — precipe la junulara — ofte aperas artikoloj pri Esperanto, tiam ni havas la respondon al la demando, de kie aperas tiom da miloj da esperantistoj en lando, kiu nur lastatempe provas organizi sian Esperanto-movadon. En Soveta Unio do temas pri tute nova dimensio de grandskala informado pri la Internacia Lingvo Esperanto.

sm

TEATRO:

Denove festivalo en Budapeŝto

Laŭ *Hungara vivo*, de la 18a ĝis la 27a de marto ĉi-jare en Budapeŝto denove okazos Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Kiel pasintjare (vidu ampleksan raporton en nia numero de majo 1982), la Renkontiĝo okazos en la kadro de granda neesperantista aranĝo — Budapeŝta Printempa Festivalo, kiu ankaŭ fincos la partoprenon de Esperantaj teatraj trupoj.

Oni planas la prezenton de deko da teatraĵoj en la Internacia Lingvo. Ĉefrolas — kiel pasintjare — hungaraj trupoj, sed venos ankaŭ polaj kaj bulgaraj Esperantaj teatraj ensembloj. Laŭ la provizora plano, almenaŭ duono de la planitaj prezentaĵoj estos premieraj, antaŭe neluditaj en Esperanto. Ili inkluzivas kelkajn famajn dramajn aŭtorojn, i.a. A. Strindberg kaj S. Beckett.

Intertempe, Hungara Esperanto-Asocio devus jam havi multajn pliajn detalojn, precipe pri la ĉeesto de eksterlanda esperantista publiko. Skribu pri tio al: HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Potenca ĉeestantaro

Signifan kontribuon al la prilumo de la lingva demando en la kadro de Unuiĝintaj Nacioj faris lastatempa konferenco, organizita en Nov-Jorko fare de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (CED). La konferenco, kiu kunigis pli ol cent personojn, okazis en la domo de la Nov-Jorka Oficejo de UEA kaj estis plejparte organizita de la Laborgrupo pri Esperanto ĉe UN, kiu respondecas pri la funkciigo de tiu oficejo. La ĉeestantoj, kiuj inkluzivis plurajn konatajn homojn el Unuiĝintaj Nacioj kaj el inter la gvidantoj de la fako de lingvo-instruado en Usono, aŭdis serion da prezentoj kun precipe du celoj: klarigi al la usonaj lingvo-instruistoj la gravecon de la internacia debato pri komunikado kaj ĝiaj rilatoj al la demando de lingvoj, kaj montri al la specialistoj pri komunikado kial la lingva aspekto estas nedisigebla elemento en la klopodoj atingi pli egalecan komunikan ordon en la mondo.

La konferencon malfermis persono bone konata al la parolantoj de Esperanto, s-ro Robert Muller, vica ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiu siatempe faris la malferman paroladon en la Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno en 1979. Lin sekvis d-ro Humphrey Tonkin, profesoro en la Universitato de Pensilvanio kaj estrarano de UEA pri esploro kaj dokumentado, kiu faris la ĉefan paroladon de la tutaga konferenco. En sia parolado li ekzamenis tri aspektojn de la debato pri komunikado kiu aktuale disvolviĝas en la sino de Unesko kaj UN: la tutan demandon pri komunikaj rajtoj kaj precipe pri la rajto je komunikado, la Novan Mondan Informan kaj Komunikan Ordono, kaj la celojn de la Monda Komunikaj Jaro.

La Monda Komunikaj Jaro traktas (diris prof. Tonkin) unuavice la substrukturejojn de la komunikado, do la fizikajn instalaĵojn, kiuj ebligas la modernan komunikadon. Tamen, lingvo tute similas tian instalaĵon, funkciante laŭ analoga maniero, en kiu la utiligo de difinita lingvo kreas dependecon de la utiliganto al la originanto de la lingvo, same kiel la akcepto de difinita teknologia sistemo kreas dependecon de la konsumantoj al la fabrikintoj de tiu sistemo. Li emfazis la fakton, ke lingvoinstruistoj, konkraste al tiuj, kiuj kredas je la nepra venko de la angla lingvo, laboras por certa egaleco kaj reciprokeco de la lingvoj. Tiu estas bazo por ideala aliro al la tuta demando de lingvoj. Kvankam li ne rekte aludis al Esperanto en tiu kunteksto, klare lia intenco estis reliefigi la proksimecon de la celoj de la parolantoj de Esperanto al tiuj de la instruistoj de fremdaj lingvoj, almenaŭ en Usono.

La paroladon de d-ro Tonkin sekvis podia diskuto, en kiu partoprenis Richard I. Brod, direktoro de la

Asocio de Fremdlingvaj Fakoj (en la usonaj universitatoj kaj kolegioj), Edward Seebold, direktoro de la Amerika Konsilio pri Instruado de Fremdaj Lingvoj, kaj Jane Edwards, de la Universitato Harvard, kiel prezidanto. La diskuto ĉefe rilatis al la stato de lingvolernado en Usono, kie la scio de fremdaj lingvoj, eĉ inter universitatanoj, estas tre malalta, kaj multaj homoj, kiuj sukcese trapasas mezlernejojn aŭ eĉ studas en universitatoj, tute ne konas aliajn lingvojn krom la angla.

Post lunĉopaŭzo venis la por multaj ĉeestantoj plej interesa sesio de la tago, pri "Lingvo, komunikado kaj la estonteco." Komencis la sesion Janet Byron, profesoro en la Ŝtata Universitato en Cleveland kaj lastatempe nomita vicredaktoro de la revuo de CED *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. D-rino Byron parolis pri la lingvo-planado en socialismaj landoj kaj en la landoj de la Tria Mondo. Ŝian kleran kontribuon sekvis raporto de Andrea Kavanaugh, vicedirektoro de la usona Nacia Komitato por Internaciigi Klerigadon per Satelitoj. Ŝi klarigis lastatempajn praktikajn elprovojn instrui lingvojn pere de satelitoj; ĉe tio oni transportas la televidilojn en la vendejojn kaj kunvenejojn en difinita alia lando kaj senpere transsendas televidajn prezentojn al Usono. En usona klasĉambro la lernantoj de la koncerna lingvo senpere traktas kun la televidataj homoj en la lernata lingvo. Bruce Sherwood, profesoro en la Universitato de Illinois kaj estrarano de CED, prezentis en sia parolado eĉ pli rimarkindan inventaĵon: voĉsintezilon, kiu, ligite al komputilo, ebligas al lernanto ekzerci la parolatan lingvon kaj senpere reprodukti sonon. La sintezilo bone funkcias kaj por la hispana kaj por Esperanto. Per portebila komputilo prof.

Nova limdato por la konkursoj pri jubileaj afiŝo kaj simbolo estas la 31a de majo '83!

La Estraro de UEA nomis apartan komisionon, kiu trarigardis pli ol 100 konkursaĵojn por la jubileaj afiŝo kaj simbolo. Kvankam inter la ricevitaj konkursaĵoj troviĝas pluraj kun tre elstaraj trajtoj, la komisiono opinias, ke neniu el ili ankoraŭ atingas la deziratan nivelon. Tial la konkursoj restas malfermaj ĝis la fino de majo ĉi-jare. Novajn konkursaĵojn bonvolu sendi al la Grafika Centro de UEA, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Tien direktu ankaŭ petojn pri pliaj informoj.

Sherwood povis surloke fari specimenan lecionon. Parolado de Andrew Smith, prezidanto de eduka organizaĵo Terglobaj Perspektivoj en la Edukado, kompletigis la sesion, kiu okazis sub prezido de Joan Gilde-meister, profesorino en la Universitato Howard, en la usona ĉefurbo Washington.

En la fina sesio de la tago estis kvar parolantoj. D-ro Leo Bernardo estas estro de la Fakoj pri Fremdaj Lingvoj en la Lerneja Administracio de la Urbo Nov-Jorko, homo tre influhava kaj alte respektata inter la lingvo-instruistoj. Li komencis la sesion, kies temo estis "Remeto de la Lingvoj en la Studprogramojn." Li pri-skribis novajn tiucelajn iniciatojn en la urbo kaj ŝtato Nov-Jorko. Precipe ĉi-lastas havas tre ambiciajn planojn por reenkonduko de lingvo-instruado en la elementajn lernejojn, kie momente ĝi preskaŭ tute mankas. Claire Gaudiani, profesoro en la Universitato de Pensilvanio, parolis pri sia granda projekto por helpi la unuopajn fakojn pri fremdaj lingvoj en usonaj kolegioj kaj universitatoj revizii la studprogramojn kaj reveki la interesiĝon de la studentoj pri lingvolernado. Lynda Icochea, de la Komunuma Kolegio de Bergen, en Nov-Jerzejo, parolis pri nova iniciato en tiu kolegio, kiu ligas la instruadon de lingvoj kun la bezonoj de la komercaj rondoj en la ĉirkaŭaĵo de la kolegio. Fine prof. William Orr, el la Universitato Hofstra, parolis pri utiligo de Esperanto kiel enkonduko al la lingvolernado. Prezidis la sesion prof. Julius Manson, de la Kolegio Baruch en la Urba Universitato de Nov-Jorko.

La tago finiĝis per du aparte interesaj resumaj paroladoj. José-Miguel Alfaro estas eksa vicprezidento de Kostariko kaj ano de la Konsilio de la nove fondita Universitato de Paco, kiu laboras en la kostarika ĉefurbo sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj. Li emfazis la gravecon de la kompreniĝo inter la homoj por la konstruo de la paco. Lin sekvis s-ro Mahfuz Anam, komisiito pri komunikado en la Oficejo de Unesko ĉe UN, kiu parolis pri la neceso krei egalecon de komunikado inter la diversaj homoj kaj ŝtatoj.

La konferenco escepte bone atingis sian celon: ĝi malfermis amason da vojoj al Unuiĝintaj Nacioj por UEA kaj CED, ĝi konsciigis kaj la lingvoinstruistojn kaj la specialistojn pri komunikado pri la proksimaj ligoj inter ili, kaj ĝi donis al CED, precipe en usona kunteksto, novan prestiĝon de serioza organizaĵo, interesiĝita pri eltrovo de solvoj al la lingva problemo — precipe egalecaj solvoj, kiuj inkluzivas Esperanton. Por la anoj de la Laborgrupo pri Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj ĝi reprezentis ian mejloŝtonon: la akceptiĝon de ilia laboro en la kadro de UN.

Tuj post la konferenco okazis en alia salono akcepto de UEA okaze de la Zamenhofa Tago. Multaj partoprenintoj de la konferenco transiris al tiu akcepto, ĉe kiu ankaŭ troviĝis multaj amikoj de Esperanto kaj diplomatoj el la diversaj misioj. (Vidu apartan informon pri la Zamenhof-festo en Nov-Jorko.)

Zamenhofa Tago en Nov-Jorko

La 15an de decembro, la Nov-Jorka Oficejo de UEA por la tria fojo aranĝis Zamenhof-feston. Ĝi denove estis okazo por gravaj kontaktoj kun oficialuloj de Unuiĝintaj Nacioj. Pli ol cent personoj partoprenis en la festo de ĉi tiu specialigita oficejo de UEA por rilatoj kun UN. Inter la ĉeestantoj estis pluraj partoprenintoj de la samtage okazinta konferenco de CED kaj kelkaj altrangaj diplomatoj ĉe UN.

D-ro H. Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN, donacis la anglan tradukon de la verko de E. Privat Vivo de Gandhi al s-ro Natarajan Kriŝnan, ambasadoro de Hinda Unio ĉe UN. La ambasadoro en siaj dankvortoj aludis ankaŭ la lingvan problemon en Hinda Unio. Poste, al d-ro Ferenc Somogyi, kiu anstataŭis la hungaran ambasadoron Pál Rác (nuna prezidanto de la Ĝenerala



Ambasadoroj Kriŝnan kaj Pelletier

Asembleo de UN), iris donace la duvoluma antologio *Tutmonda sonoro* de K. Kalocsay. D-ro Somogyi emfazis la inviton partopreni en la 68a UK en Budapeŝto kaj diris siajn bondezirojn en Esperanto. La tria librodonaco iris al s-ro Gérard Pelletier, ambasadoro de Kanado, kiu siavice menciis la postan UK en Vankuvero. Pro manko de konvena kanada eldonaĵo en Esperanto, la ambasadoro Pelletier ĝoje akceptis ekzempleron de *Asteriks la gaŭlo*.

Inter la diplomatoj en la Zamenhof-festo troviĝis ankaŭ s-ro Mahfuz Anam el la Unesko-oficejo ĉe UN kaj s-ro Alfred Edward el la Misio de Sri-lanko ĉe UN.

Salutparoladon en ĉi tiu tre sukcesa aranĝo faris d-ro William Orr, profesoro ĉe la Universitato Hofstra en Nov-Jorko.

Provo ordigi kaj sistemigi la fakan laboron

De la 7a ĝis la 12a de decembro 1982, en Bad Saarow (Germana DR), okazis internacia seminario pri la temo: "Aktualaj problemoj de scienca kaj teknika aplikado de Esperanto". La seminarion organizis Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR, landa asocio de UEA (kiu cetere aŭspiciis la seminarion).

Al Bad Saarow — kie unu jaron pli frue okazis seminario pri planado — ĉi-foje venis 34 fakuloj el 11 landoj (Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, FR Germanio, Francio, Germana DR, Hungario, Italio kaj Svedio). Ili aŭskultis kaj pridiskutis 25 prelegojn, kiuj temis ĉefe pri:

1. terminologiaj principoj kaj alia aplikado al la faklingvo de Esperanto;

2. rezultoj de aplikado de Esperanto en diversaj sciencaj branĉoj kaj fakoj.

Tre elokvente pri la laboro de la seminario parolas la duĉapitra konkludaro, kiu akompanas ĉi tiun tekston.

KONKLUDARO 1:

Aktualaj taskoj pri la disvastigo kaj evoluigo de Esperanto sur fakaj terenoj

Pro la pligraviĝo de la rolo de la scienco kaj tekniko en la evoluo de la socio, ankaŭ en la Esperanto-movado fariĝis necese plirapidigi la evoluon de la fakaj aplikado kaj disvastigo de la lingvo. El tio sekvas taskoj, realigendaj parte ene de la movado, parte en kontaktiĝo kaj kunlaboro kun la ekstermovadaj fakaj medioj, kies plenumon la partoprenantoj de la Seminario rekomendas:

1. Estas necese evoluigi la **terminologion** laŭ Konkludaro 2.

2. Estas necese evoluigi la **fakliteraturon**.

- 2.1. Periodaĵoj ĝeneralkarakteraj, okupiĝantaj parte pri la fakrilataj problemoj kaj publikigantaj artikolojn pri sciencaj branĉoj kiuj ankoraŭ ne kapablas estigi propran fakrevuon, estas plu necesaj.

- 2.2. Periodaĵoj unufakaj estas ĉiam bonvenaj kiam la fakularo atingis sufiĉan nombron por vivteni ilin.

- 2.3. La reprezentantoj de la eldonejo de la fakaj periodaĵoj devus pritrakti la eblecon por komuna abonigo de siaj periodaĵoj (abono por "scienca revuaro"), por tiamaniere pliekonomiigi kaj plicertigi la aperadon. Tiu

Almenaŭ unuavide, tiuj konkludoj ŝajnas esti la unua kaj tre necesa provo inventari la problemojn sur la diversaj kampoj de la faka agado, por poste provi ordigi kaj sistemigi la laborojn.

Tiuj konkludoj eventuale provokos diskuton, kiu verŝajne eĉ estas unu el iliaj celoj. Precipe la Konkludaro 2 surprizas per la proponata vojo por normigi terminologiajn laborojn. Kvankam tie ĉefrolas Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto, ne temas pri konkludoj (aŭ proponoj) de UEA mem sed nur de seminario, kiun ĝi aŭspiciis.

La demando, kiu ludos la normigan rolon en la terminologia laboro, ne estas solvebla per dekreto (kiel sonas la Konkludaro 2). Aldone al la terminologiaj sekcioj de la Akademio kaj de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista), ni nun havas ankaŭ Terminologian Sekcion de Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA. La fakto, ke oni sentas bezonon krei tiun trian sekcion atentigas, ke la unuaj du ne, aŭ ne plene, ekfunkciis. Sed multilate ankaŭ SEC ankoraŭ devas pruvi sin, unuavice per fakaj eldonaĵoj. Nur la kvalito de ĝia laboro portos al ĝi la necesan aŭtoritaton pri la normigo de la terminologia laboro.

Oni ne preteratentu tamen, ke inter la seminarianoj en Bad Saarow troviĝis pluraj tute elstaraj kaj internacie konataj fakuloj. Tie estis i.a.: P. Neergaard, V. Oljanov, H.J. Plehn, V. Novobilský, M. Duc Goninaz, W. de Smet, O. Haszpra, A. Mathé, A. Münnich kaj D. Blanke. Ĉeestis ankaŭ F. Szabó-Felső kaj P. Todorov, estraranoj de UEA.

pritraktado povus okazi dum la sekva Universala Kongreso en Budapeŝto.

- 2.4. Oni devas laŭeble helpi la aperigon de kiu-ajntema scienca aŭ popularscienca libro (traduko aŭ originalaĵo), se la ekonomieco estas iamaniere certigita.

- 2.5. Pli malpli sistema plano estas necesa por la eldonado de fakaj lernolibroj, unuavice pri la bazaj sciencoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio), sur nivelo de la kutimaj unua kaj dua studjaroj de natursciencaj kaj teknikaj universitatoj.

3. Estas necese daŭrigi la disvolvon de individuaj kaj grupaj personaj fakkontaktoj, en ĉiuj formoj (korespondado, personaj renkontiĝoj, seminarioj, konferencoj k.a.).

- 3.1. Oni devas daŭrigi kaj al pli kaj pli da landoj disvastigi la jam sukcese realigitajn iniciatojn pri la aranĝado de fakaj kunvenoj dum ĝeneralaj Esperanto-aranĝoj kaj de memstaraj fakkonferencoj (ekz. AEST-oj, IMEK-oj*), sur landa kaj internacia niveloj. Tiuj fakkonferencoj, simpozioj kaj seminarioj okupiĝu plejparte pri la rezultoj de tiel vasta spektro aŭ grupo de sciencaj branĉoj aŭ fakoj, kiu altiras sufiĉan nombron da interesitoj, sed ili dediĉu spacon ankaŭ al la problemoj de la evoluigo de la Esperanta faklingvo kaj de la disvastigo de Esperanto en fakaj rondoj.

3.2. La plej fruktodona metodo por la plifortigo de la faka agado estas la kontaktiĝo kun ne-esperantistaj fakaj organizaĵoj kaj instancoj (landaj kaj internaciaj), ebliganta reciprokajn utiligojn de siaj fortoj por la komunaj kaj certaj apartaj celoj. Surbaze de utila partopreno en la laboro de ne-esperantistaj fakorganizaĵoj, la esperantistaj fakuloj povas atingi eĉ ke ne-esperantista organizaĵo aranĝu aŭ helpu aranĝi fakan konferencon, kun Esperanto kiel laborlingvo (ekz. Internacia Kibernetika Konferenco '80 kaj '83, SVIEKO '81 kaj '84*, INTERKOMPUTO '82 kaj '84, Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo de la Sciencoj '82). Oni devas atingi, ke la ne-esperantistaj fakorganizaĵoj reprezentu eĉ per prelegoj en la Esperanto-lingvaj fakkonferencoj, krome ke ili donu lokon al Esperanto-rilataj informoj en siaj organoj.

4. Estas necese zorgi pri la superagrada faka instruado en Esperanto. Eble jam dum la sekva UK oni devas pritrakti la fondon de Instituto por Post-Diplomaj Kursoj, kiu utiligus la kunlaboron de plej diverslandaj kaj plej altnivelaj fakuloj, kapablaj instrui sian fakon en Esperanto.

5. Estas necese prepari kaj daŭre ĝisdatigi la bibliografiojn (kun indiko de la trovlokoj de la raraĵoj) de la ekzistanta fakliteraturo, kaj kolekti tiujn valorajn fakajn manuskriptojn, kiuj pro iu kaŭzo ne povas presite aperi, kaj disponigi ilin al interesitaj fakuloj.

6. Estas necese ebligi pli efikan laboron de la esperantistaj fakaj organizaĵoj. Oni devas pritrakti dum la



Neergaard, Blanke kaj Duc Goninaz pri la faka agado

sekva UK iaspecan kunfandiĝon de la fakaj organizaĵoj kun UEA, tiel ke per kuntiro kaj simpligo de la administraj taskoj la faka membraro pli efike povu sin dediĉi al fakaj laboroj. UEA donu helpon por faka agado ankaŭ al fake neorganizita fakularo. Oni daŭre devas zorgi pri ĝisdatigo kaj publikigo de fakaj adresaroj.

7. Esenca pliefikigo de la informado pri la faka aplikado de Esperanto, kaj enkadre de la Esperanto-mova-

do (nun: *Budapeŝta Informilo*, sed estonte ankaŭ la revuo *Esperanto*) kaj en kaj por la neesperantistaj fakaj medioj, estas nepra kondiĉo por la plua evoluo. Apartan studon bezonas la ekonomiaj problemoj de la multlingveco kaj la kvanta pruvo de la utilo de Esperanto ĉirilate.

8. En ĉiaspeca supreskizita agado oni devas nepre zorgi pri la financa bazo (abonado, antaŭmendoj, reklamoj, subvencioj k.a.).

9. En la plenumo de la supreskizitaj taskoj, ĉiuj kompetentaj unuopuloj kaj diversgradaj organizaĵoj povas kaj devas partopreni. Specifan rolon devas havi la Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA, precipe pri la taskoj listigitaj sub punktoj 2.4, 2.5 kaj 5. Same SEC — krom propra agado koncerna — devas okupiĝi pri konsilado en preskaŭ ĉiuj supre menciitaj terenoj, precipe koncerne la internacian kunordigon de la agadoj.

10. SEC tre bezonas helpon kaj kunlaboron de fakuloj en sia agado (precipe en verkado, tradukado, selektado, lingva-faka reviziado, redaktado de siaj eldonaĵoj, interalie tiu de la *Sciencaj Komunikaĵoj*).

KONKLUDARO 2:

Evoluigo de la terminologia laboro

La partoprenantoj de la Seminario:

1. konscias, ke en ĉiuj lingvoj la faklingvo devas submetiĝi al racia planado, des pli en la planlingvo Esperanto;

2. konscias, ke faka aplikado de Esperanto disvolviĝis kiel esenca parto de la ĝenerala evoluo de la lingvo, kaj ke por la evoluigo oni devas atenti ĉiam la kvalifiktan laboron jam faritan;

3. plene aprobas, ke la Terminologia Sekcio de la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto ne havu rolon nur registran kaj kunordigan sed ankaŭ lingvonormigan;

4. rekomendas evoluigi la terminologian agadon sur scienca nivelo, laŭ principoj de sistemigo, klasifiko kaj difinado, kun la celo atingi normigon. Plue rekomendas efektivigon de kleriga agado pri terminologiaj metodoj kaj principoj;

5. alte taksas la moralan kaj materian subtenon de UEA, specife de ĝia Scienca Eldona Centro, por disvolvado de kvalifikita terminologia agado sub la tegmento de UEA;

6. aprezas la historie establitan favoran sintenon de la Akademio de Esperanto al ĉiaj tiucelaj kvalifikitaj agadoj kaj rekomendas, ke la Terminologia Sekcio klopodu kunlabori kun ĝi kaj ĉiuj aliaj faklingvaj institucioj de la Esperanto-movado;

7. petas la Akademion de Esperanto kaj aliajn koncernajn instituciojn esplori la funkciadon de faklingva normigado en naciaj lingvoj, kun la celo aplikati la internacie establitan procedon por Esperanto.

* AEST (seminarioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko); IMEK (Internacia Medicina Esperanto-Konferenco); SVIEKO (seminario pri ekonomiko).

Forpasis

Rolf Bugge-Paulsen


La 4an de decembro 1982 forpasis en Oslo la nestoro de la norvega Esperanto-movado, Rolf Bugge-Paulsen, preskaŭ 88-jara.

Rolf Bugge-Paulsen naskiĝis en Bergen la 11-an de decembro 1894. Li studis filologion, sed fariĝis oficiro, kapitano de infanterio, kaj estis ano de diversaj humanismaj kaj pedagogiaj asocioj. Esperanton li lernis en 1907 kaj aktivis por la Movado plenajn 75 jarojn, per artikoloj en revuoj kaj gazetoj, verkado de propagandiloj, prelegoj, gvidado de kursoj ktp. Eĉ en germana militkaptiteco (1943-1945) li instruis Esperanton al samsortanoj.

Rolf Bugge-Paulsen estis prezidanto de Norvega Esperantista Ligo (1919-1934 kaj 1937-1947) kaj ano de la norvega ekzamena komisiono (1921-1941), membro de la Lingva Komitato, poste Akademio de Esperanto (1932-1982), Komitatano de UEA (1922-1962). Li restarigis la revuon *Norvega Esperantisto* kaj estis ĝia redaktoro aŭ kunredaktoro (1922-1924 kaj 1932). Li preparis la kurson de Andreo Cseh en Oslo (1930), evento, kiu revivigis la tiam dormantan norvegan movadon. Li estis dum multaj jaroj komisiito de NEL pri interŝtataj organizaĵoj, kaj en tiu funkcio i.a. iris al Strasburgo en 1956, kiam la Kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro traktis Esperanton, kaj kolektadis membrojn por la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-jaro (1959) kaj proponantojn de UEA por la Nobel-premio de paco dum multaj jaroj.

Li partoprenis multajn Universalajn Kongresojn, proks. 20-foje kiel oficiala reprezentanto de la Norvega Registaro. Li gvidis la unuan (kaj ĝis nun solan) Esperanto-kurson per la norvega radio (1928-1929), verkis radio-vortaron norvegan-Esperantan-anglan (1925-1929), la 2an kaj 3an eldonojn de la norvega ŝlosilo (1934, 1956 kaj "malŝlosilon" 1972), norvegan prilaboraĵon de la lernolibro *Sistema kurso de Esperanto* de Seppik kaj Malmgren (4 eldonoj: 1935, 1938, 1947, 1955), redaktis konstantan radio-rubrikon en la programrevuo "Radiobladet" (1932-1940) kaj la kajeron *Faktoj pri Norvegujo* (1953), kaj tradukis la artverkon *Skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto* (1951). Li estis kolektanto de esperantaĵoj, precipe glumarkoj kaj eldiroj de famuloj pri Esperanto. Li estis Honora Membro de Klubo Esperantista en Oslo kaj de UEA kaj Honora Prezidanto de Norvega Esperantista Ligo, kaj posedis la Grandan Krucon de la ordeno de NEL, "Pro Merito".

Rolf Bugge-Paulsen estis "ĝisosta esperantisto", firme konvinkita pri Esperanto kiel la solvo de la monda lingvo-problemo. Li estis afabla, amikema homo, ĉiam preta kunlabori por nia afero, kaj liaj scioj



R. Bugge-Paulsen estis unu el la plej elstaraj norvegaj aktivuloj en la internacia E-movado.

estis tre vastaj, kaj pri la lingvo mem kaj pri la Movado. Li ĉiam okupos gravan lokon en la historio de la norvega Esperanto-movado.

C. Støp-Bowitz

LANDA AGADO:

Kvar raportoj el Irano

En la tuta jarkolekto de nia revuo por 1982 pri Irano aperis nur unu mallonga informo en "Loke-Fake-Persone", kaj ankaŭ ĝi temis pri libroj, ne pri la movada vivo en tiu lando. Mankis simple kontaktoj kun la esperantistaro tie. Nun ŝajnas, ke la situacio ŝanĝiĝas, ĉar lastatempe venis kvar ampleksaj raportoj el Teherano. Kio konstateblas el ili?

Pro la komplika kaj malfacila situacio, kiu regas en la lando, la Esperanto-agado tie ne ŝajnas havi la samajn amplekson kaj furoron kiel antaŭ kelkaj jaroj. Tamen, tiu agado ankoraŭ daŭras kaj plurilate estas pli vasta ol en multaj landoj kun tradicia kaj "forta" E-movado. Prof. M.H. Saheb-Zamani ankoraŭ restas la centra figuro en la esperantista laboro en Irano. Li nun gvidast.n. "Iran-Esperanto-Labor-Grupojn", kiuj disvolvas sian agadon en specifaj kampoj, kunvenas, diskutas, planas, ree kunsidas, raportas, interkonsiliĝas kaj ĝenerale viglas en la informa laboro. Jen kelkaj ekzemploj el la agado de la laborgrupoj:

La Laborgrupo 4 (pri kiu raportas s-ino Ĵila A. Saheb-Zamani) regule aŭskultas preskaŭ ĉiujn Esperantajn radioprogramojn. La grupo tiel notis elsendon,

kies enhavo estas novaĵo ankaŭ por ni: programon de "La Voĉo de Ameriko", kiu la 3an de oktobro 1982 amplekse informis pri Esperanto en sia perslingva elsendo. Tiu programo ligiĝis al pasintjara kongreso de futurologoj en Usono, al la lingva problemo ĝenerale kaj al Esperanto kiel ĝia ebla solvo. Laŭ la irana laborgrupo, en la programo oni diris ankaŭ jenon pri Esperanto: "La lingvo vivas kaj ĝi nuntempe havas, interalie, pli ol 20 radiostaciojn, inkluzive de Radio Vatikano kaj — precipe — Radio Pekino, kiu ĉiutage elsendas Esperante, mondvaste. La vortstrukturo de Esperanto estas bazita sur hindeŭropaj lingvoj, kaj la gramatikon inspiris verŝajne la ĉina."

Fino Ŝirin Ahmad-Nia raportas pri la agado lige al Internacia Industria Ekspozicio, kiu okazis en Teherano fine de septembro 1982. Tiam, dum 12 tagoj, 32 iranaj geesperantistoj vizitis 62 ekspozicianojn el 22 landoj kaj parolis kun ili pri la lingva problemo kaj pri Esperanto. La laborgrupo atente planis tiun informan kampanjon kaj armis sin per la disponeblaj komercaj kaj turismaj prospektoj en Esperanto, samkiel per diverslingvaj informiloj pri la lingvo. "Kvankam ne ĉiu ekspoziciano esprimis sin favore al Esperanto, tamen, nur rimarkinde malmultaj (3 el 62) opiniis, ke Esperanto ŝajnas esti nerealigebla optimista idealo." Irananoj renkontis tie "iamajn esperantistojn" (i.a. el Aŭstrio kaj Hungario), kiuj entuziasme rakontis pri sia junaĝa lernado de la lingvo. Unu el la ekspozicianoj diris: "Mi travivis multajn memorindaĵojn en Irano; sed, se oni demandas min pri la plej agrabla, mi ja rakontos pri surpriza alveno de multaj iranaj esperantistoj, alparolantaj min perse, angle, france aŭ eĉ germane, kiuj senĉese postulis de ni Esperantajn katalogojn, broŝurojn k.s. Tio vere igas min serioze pensi pri Esperanto."

S-ro Ahmad R. Mamduhi informas pri la agado de la laborgrupo pri eksteraj rilatoj. Ĝi atente studis la pasintjare en nia revuo aperintajn tekstojn de T. Sekelj pri Esperanto kaj la Movado de Nealiancitaj Landoj. La laborgrupo kontaktis i.a. la iran anbasadoron en Unuiĝintaj Nacioj, d-ro S. Rajaie, kiu reagis letere, kuraĝige.

Alia raporto de s-ro Mamduhi rakontas pri la entuziasmo per kiu la iranaj esperantistoj atendas la ĉi-jarajn numerojn de *Kontakto*, kun legaĵoj speciale destinitaj al la komencantoj. El la sama raporto oni konstatas, ke la esperantistoj en Teherano ankoraŭ luas (vidu nian numeron de decembro 1981, p. 209) trietaĝan domon en kiu kunvenas la laborgrupoj, okazas kursoj kaj disvolviĝas vigla E-laboro. Ĉiun duan semajnon en la domo okazas kvazaŭ ia asembleo de la laborgrupoj, por aŭdi raportojn pri la faritaĵoj kaj plani novajn paŝojn. Post ioma paŭzo, ankaŭ la gazetaro ree komencas skribi favore pri Esperanto. Ŝajnas, ke la agado en Irano ne limiĝas nur al la ĉefurbo, kvankam ĝi tie sendube estas la plej forta kaj la plej vigla.

Fortega personeco, halucina stilo

Lappar, la antikristo; Originalaj noveloj, de Endre Tóth (1931-1981). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 139 p. 19 cm. ISBN 963 571 048 8. Prezo: 13,80 gld.

Ĉu diablo, ĉu homo, ĉu masko, la figuro aperanta, nigra sur ruĝo, tordita, minaca, sur la kovrilo de ĉi tiu novelaro? Kaj la enhavo de la libro same enpensis kaj malfacile povas esti komprenata. La stilo halucina de Tóth, liaj frazoj, tamen ĉiam konsekvencaj, kie ĉiu leganto povas rekoni siajn neformiĝintajn esprimojn kaj eĉ sentojn sub la nivelo de sia konscio, la situacioj entenantaj en sia banalo centojn da interpret-eblecoj, faras el la libro ion ne facile flankenmeteban por inteligenta kaj almenaŭ iom kulturita leganto. Ekzemple: "... Mi kuris dum mi kapablis, poste ĉe poŝkesto mi haltis, por forviŝi la ŝviton. Mi metis mian ĉapelon sur la poŝkeston. Eĉ mi lasis ĝin tie, ĉar la ĉapelo tre konvenis al la kesto. Mi bedaŭrus lasi la keston senĉapela en pluv-ego." (p. 50). Mi ĉerpis hazarde, por montri kio estas repuŝa kaj kio estas alloga, aŭ povas al'gi: tiu intermiksado de realo kun nerealo, tiu animigo de konkretaj aĵoj, tiu ekstrema subjektiveco. Aŭ: vojperdinta biciklisto, kiu devas atingi la stacidomon kaj neniel sukcesas se li rezonas kaj eliras el la rutino per kiu ni faras iajn agojn, iajn gestojn, fumante "nefortan cigaredon". Denove mi ĉerpis hazarde. Forpuŝi la libron, aŭ provi kapti la mesaĝon kiu venas de ĉiu epizodo, de ĉiu frazo, de ĉiu vorto (vidu la insiston pri la vorto "fatraso")? Sed almenaŭ legu la unuan novelon, la demonan, kiu donas la titolon al la kolekto. Kvar bubaĉoj. "nek pli nek malpli bravaj ol la aliaj", sed ĉiu tre bone karakterizita, sub la gvidado histeria — senkompata — memekzalta de Lappar: kiel ne provi diveni la nomon — aŭ la nomojn, laŭ la epokoj, de tiu antikristo en ĉifonoj? Kiu? Caracalla la freneza imperiestro, aŭ Frederiko la urbbruliginto, aŭ Hitler la fanatikulo, aŭ... ĉiuj mortigitaj de siaj propraj faroj, ĝuste kiel Lappar.

La rakontoj havas forton kiu nepre katenas, ankaŭ se kelkaj noveloj, precipe je la fino, estas iom "facilaj"; facile interpreteblaj, mi volas diri: kiel la dispereo de la familia sento en la lasta radioludo. Fortega personeco, ĉiuokaze, emergas el ĉiu paĝo de Tóth: ne perfekte evoluinta, ne plene estranta la materiojn kiujn li eltiras el sia bolanta fand-kaldrono, sed inda je la alta konsidero kiun lia frua morto solidigas en bedaŭro pro la manko de ne plu estigeblaj provoj.

Clelia Conterno (Italio)

Por ke la homo ne ripetu

Strangled Cries, de Julius Balbin. El Esperanto en la anglan trad. Charlz Rizzuto. Merrick (New York): Cross-Cultural Communications, 1981. 24 p. 22 cm. Dulingva eldono: angla kaj Esperanta. Prezo: 12,90 gld.

Ekzistas tiuj, kiuj opinias, ke la hororoj de la Dua Mondmilito devas forviŝiĝi el la homa memoro, ekde la urbobombadoj — inkluzive tiujn per atombomboj — ĝis la ekstermejoj. Tiel pensas precipe anoj de la plej junaj generacioj, kiuj rifuzas ĉiun respondecon pri la agoj de siaj gepatroj kaj geavoj. Parte ili ja pravas: nek la nunaj angloj respondecas pri la fiagoj de la Dukoj de Lankastro, nek la aŭstroj pri tiuj de la ĉefepiskopoj de Salzburgo, sed nek unuj nek aliaj hontas montri ties torturĉambrojn. Kiel ekzemplojn, por ke la homo ne ripetu tiajn monstraĵojn. Nu, ĝi inventis novajn, eĉ pli rafinite sadismajn. Ankaŭ tiujn necesas montri, por ke iam la homo komprenu, ke li ne rajtas tiajn aferojn fari al sia similulo. Mi vizitis Dachau kaj Mauthausen, sed ne sukcesis iri ĝis la fino. Probable mi estas tro molaĉa, sed neeble, ke eĉ la plej hardita krimulo ne sentos naŭzon ĉe tiuj vidaĵoj.

Ankaŭ skribu oni povas lasi monumentojn memorigajn. La magra broŝuro de Balbin tiucela, tamen, ŝajnas nura eta komplemento: sole per si mem la poemoj povas elvoki nur palan ideon pri la hororoj suferitaj de la koncentrejoj. Temo tiel serioza postulas pli ampleksan pritrakton, kun pli da materialo skriba kaj eventuale fotografa. Komparu kun la profunda impresio, kiun postlasas la *Bilda dokumento Hiroŝima-Nagasaki*.

Tre laŭdinde la eldono estas dulingva, speciale ĉar kunrolas la angla. Espereble tio estas la unua provo tia kaj multaj aliaj sekvos por disvastigi la originalan Esperantan literaturon pere de naciaj lingvoj. La tradukinto, Charlz Rizzuto, opinias, ke "la signifaj atingoj de Esperanta poezio devus fariĝi disponeblaj en angla traduko." Mi aldonus: ne nur en angla.

El la unua originala poemo elfalis triversa strofeto; ĉar ĝi multon signifas por la enhavo, oni devus tion ripari per engluo. Glosareto pri la germanaj vortoj, ĉefe pri la forgesita negermana "kapo", helpus la komprenon por neinicitoj en koncentrejoj.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Se aŭskultas la animo

Guido Gezelle. Red. Bert Peleman. Antwerpen: Uitgeverij MIM, 1980. 112 p. Ilus. 31 cm. Bind. Prezo: 60,00 gld.

Guido Gezelle, granda flandra poeto, naskiĝis en 1830. Okaze de lia 150a naskiĝtago aperis ĉi tiu bele ilustrita libro: elektitaj poemoj kun tradukoj en 12 ling-

voj. La Esperanto-tradukoj estas de Hector Vermuyten. Ili jam aperis en libreto "*Se aŭskultas la animo*" (1939). Estas bone, ke nun pli vasta publiko povas ĝui ilin.

En 1830 Belgio fariĝis sendependa nacio, sed la nederlanda lingvo, la lingvo de Flandrujo, ne ricevis egalajn rajtojn. La franca estis la lingvo de edukado, kaj talentaj flandroj, kiel Verhaeren kaj Maeterlinck, fariĝis franclingvaj verkistoj. Oni rigardis la flandran kiel lingvon de kamparanoj kaj laboristoj. Gezelle revivigis la flandran literaturon. Li donis al sia popolo poezion el ĝia propra fonto, kaj la lingvon de sia okcident-flandra dialekto li uzis libere kaj brile. Inspiris lin la naturo de la lando: nuboj, arboj, birdoj, insektoj. En unu el siaj plej konataj poemoj li demandas, kion skribas la "skribisteto", eta blank-nigra besteto, kiu rondiras sur la akvo, kaj ĝi respondas: la nomon de Dio. La tuta naturo parolis al li pri Dio. Li ludis per la lingvo kun mirinda efiko; la sonefiko de lia priskribo de la ranoj, kiuj ĝenis lian aŭskultadon de najtingalkanto, montras lian humuron. Sed flanke de poemoj en leĝera tono, aliaj eldiras lian malfeliĉon. Li estis katolika pastro kaj profunde religia homo, sed ne ĉiam trovis inter la eklezianoj la komprenon, kiun lia sentema animo bezonis. Dum juneco li verkis poezion, dum mezaĝo li silentis kaj multe suferis, sed maljuna li kreis siajn plej brilajn kaj inspirajn versojn.

Gezelle mortis en 1899 en Bruĝo, sia naskiĝurbo, kie lia statuo kaj la Gezelle-muzeo atestas pri la honoro, kiun li meritas kaj postmorte ricevis, kiel eble la plej pura lirikisto de la nederlanda poezio.


El la 22 poemoj, kiujn Vermuyten tradukis, ses aperas en ĉi tiu kolekto. Kompare kun kelkaj tradukoj, en la sama libro, en aliaj lingvoj, ekz. la angla, ili montras la talenton de la tradukinto, kaj la kvaliton de nia lingvo kiel portanto de tio, kion Goethe nomis mondliteraturo.

Albert Goodheir (Britio)

Distra, amuza, pensiga

La naŭa kanalo, de István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 104 p. 21 cm. ISBN 963 571 037 2. Prezo: 13,80 gld.

"La naŭa kanalo" devus ne ekzisti en lia televida sistemo. Tamen, ĝi prezentis al li bildojn pri invado de eksterteruloj sur la teron, uzante ĝuste **lian** domon! Por ni legantoj, "La naŭa kanalo" — nomo de rakonto kaj de fenomeno — estas ankaŭ io alia: rakontaro, verkita de gajninto de literaturaj konkursoj Esperantaj kaj verkisto en la hungara. La rakontoj estas tre mallongaj, kaj ĉiu centriĝas ĉirkaŭ unu sola ideo, en ĝenerala fantazia formo: "kio okazus se...". Ni kunimagas kun Nemere, do, kio okazus, se barilgardanta fervojisto ne plu eltenus la bruon kaj retiriĝus al malproksima montara vilaĝo; kio okazus, se vere "ve" krius la "vekrianta"



Julius Balbin kaj la libro de Nemere

vento; kio okazus, se aliplaneda ekologia medio kapablu elĉerpi la memoron de vizitantaj teranoj, se freneza reĝo enŭius al la birdoj, se homo dungigŭs kiel "fantomo" por logi turistojn al hotelo, kaj tiel plu. La formo, do, estas tiel simpla, ke ĝi pensigas pri gimnaziaj verkaj ekzercoj. Tamen, Nemere ĝin tiel lerte uzas, ke (plejparte) la rakontoj kapablas enkonduki eĉ rezisteman recenziston en lian mondon de fantazio.

La lingvouzon — ĉiam diskuteblan en la Esperanta literaturo — mi trovis nek modela nek malbona, nek avangarda nek malnovstila. Ekzistas frazoj feliĉe aŭ malfeliĉe frapaj, sed malmultaj. La precipa merito troviĝas en la inspiro kaj en la prezento de la okazoj "se...". La verkisto ĉiam distras, iam amuzas sed plej ofte pensigas. Mi taksis malegala la inspiron de rakonto al rakonto: unu pri alveno de "Christo" (tiel!) en usona havena urbeto adoleske pezmanas; alia, pri kapero de flugmaŝino, juvelas. Tamen, iom surpriza mi trovis, ke post lego mi fariĝis pli pensema pri la plej ordinaraĵoj okazaj de la sekvantaj kelkaj tagoj, kaj vidis en ili multspecajn eblecojn kaj eventualecojn, kiujn mi kutime ne rimarkus. Libro kiu povas inspiri tiajn pripensemon kaj rimarkivon meritas legon.

David K. Jordan (Usono)

Surbaze de aŭtentaj fontoj

Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof, de Ludovikito (pseŭdonimo de Kanzi Itô). Kioto: Ludovikito, 1982. 303 p. 22 cm. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero 1. Prezo: 33,00 gld.

Novan biografion pri Zamenhof oni eble iom primoros: ĉu ne jam ekzistas tre bonaj? Kaj tamen estas tre konvene, ke tiun ĉi verkis ĝuste Ludovikito (pseŭdonimo malofte estas tiel trafe elektita!); kompilante la dek volumojn de la plena verkaro zamenhofa, li ja plej

intime konatiĝis kun ĉiuj liaj skribaĵoj, ne nur la konataj sed eĉ pluraj ĝis nun nekonataj. Kaj la rezulto de tiu intimiĝo estas ĉiel inda. Sin bazante sur ĉiam aŭtentaj fontoj (kiujn enkrampe li ofte indikas, de tempo al tempo metante etan demandosignon ĉe amata tradiciaĵo aŭ supozo), Ludovikito prezentas al ni pri la vivo zamenhofa bildon nepre fidindan kaj en sia sincero instigan. Ĉar, malgraŭ la "senlegenda", ĉi tiu biografio neniel fariĝis anemia pro manko de aŭtora alligiteco: male, daŭre sentiĝas, ke por Ludovikito, Ludoviko (tiel li nomas Zamenhof) estas kvazaŭ akompananto tra la vivo. Tio pleje sentebles, kiam li (en la ĉapitro 31) donas nuntempan formon de la "Deklaracio pri homaranismo"; en tiu "revizio post 3/4 jarcento" kulminas la libro. Ĝi estas esenca, same kiel por Zamenhof estis tre esenca la homaranismo. Tion ni nunuloj tro facilanime pretervidas, ŝajnas atentigi nin Ludovikito.

Ada referencado al leteroj, paroladoj, poŝtkartoj de Zamenhof aŭ al pluraj aliaj originalaj tekstoj provas instigi la legantaron, ree **mem** eklegi la plenan verkaron. Tiamaniere la biografio estas ia enkonduko al la tuta plena verkaro. Postparole la aŭtoro referencas al alia kromkajero, iel ŝtoponta la restantajn breĉojn en nia bildo pri Zamenhof: *Korespondaĵo ludovikologia*, kun la leterinterŝanĝo de Ludovikito kaj liaj ĉefaj "kondukantoj", Maimon kaj Waringhien.

Ne malpli ol 44-paĝa kronologia tabelo pri la vivo zamenhofa (mirinde detala trezorejo por scivolaj interesitoj!) kaj plena tabelo pri la unuaj 207 verkoj Esperantaj finas la libron.

Entute: bonega, inde prizorgita kaj valora verko.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Por maltedigi kursojn

La laŭta vekhorloĝo, de S. MacGill (1948 –). Groningen: Nederlanda Esperanto-Junularo, 1979. 32 p. Ilus. 20 cm. Prezo: 3, 60 gld.

Tridek roluloj, de S. MacGill. Antverpeno: TEJO, 1981. 72 p. Ilus. 21 cm. ISBN 92 9017 023 9. Prezo: 8,10 gld.

Ni agnosku — lernolibroj foje estas tedaj. Post kelkaj lecionoj, la lingvo mem ne plu sufiĉas por teni la intereson viva. Tiam vi povos ekuzi la libreton *La laŭta vekhorloĝo*, almenaŭ se viaj lernantoj estas iom junaj (ni diru: sub 30 aŭ super 60). Ne tuj en la komenco, ĉar ioma lingvoscio estas ja supozata. Sed ne tro prokrastu, ĉar ĝi paroligos viajn lernantojn. La rakonto mem estas sufiĉe surpriza por teni la atenton. Sed, en kursoj, la ĉefaĵo estos la ekzercoj (demandoj, taskoj, krucvortoj, diskuttemetoj k.s.). Ĝi certe vivecigos kurson. Unu noteto: kial ne troviĝas prononc-indiko ĉe la 30 nomoj de famuloj sur paĝo 24?

Similan uzon trovos *Tridek roluloj*. Ĝi centriĝas ĉirkaŭ 5 malgrandaj teatraĵoj. Tiuj skeĉoj mem foje

centriĝas ĉirkaŭ gramatikaĵo (-u, -n, -iĝ-), foje ne. Ankaŭ al ili aldoniĝis ekzercoj. Jam post kelkaj lecionoj, la lernantoj povos ludi tian skeĉon, kaj do paroli aktive la lingvon. Tio ne signifas, ke la teatraĵoj ne taŭgus por enscenigo ekster la kadro de kurso! Iuj el ili premiĝis en la Belartaj Konkursoj. Amuzaj ili ja estas.

Wouter Pilger (Nederlando)

Obseda, preskaŭ morbida paseismo

Angoro; Poemaro. de Karolo Piĉ (1920-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 97 p. 20 cm. Prezo: 22,20 guldenoj.

Kion diri pri la poezio de Karolo Piĉ? Kvankam ne tute ortodoksa laŭ la klasika verstekniko, tamen perfekte belsona por la orelo. Restas do komenti la enhavon kaj per tio la poeton. Al tio li rajtigas nin, nudigante sian animon, kelkfoje kontraŭdire al si mem. En la belega "Herbaro" li asertas, ke en nia vivo gravas ne tio, kion ni ricevis — ĝin ni ne povas kunporti — sed tio, kion ni fordonis dum nia vivo, nome la ĝojoflorojn donacitajn al niaj proksimuloj — nur ilin ni kunportos. Alivorte, feliĉo signifas feliĉigi la aliajn kaj oni nin memoros pro tio, kion ni postlasis. Kiam temas pri politiko, li montras eksterordinaran kuraĝon. En "Char treuse de Parme" kaj "Almenaŭ tri kolorojn" li aŭdace vipas tiujn, kiuj *baras la ceterajn memstare pensi*. Nu, almenaŭ li rajtas memstare pensi kaj eĉ siajn pensojn libere esprimi. Ĉe nia (or)flava flanko ankaŭ ne ĉio estas rozoj, ankaŭ ĉi tie oni amaskomunikile enmartelas ideojn en niajn kapojn kaj ekzistas lokoj, kie eĉ la simpla mencio de vorto, kiel ekzemple "gorilo" povas signifi torturon, karceron, malaperon.

Kiel vera poeto, li antaŭvidas la futuron de la homaro, foje optimisme, kiel en la "granda Advento" aŭ kiam li diras, ke *eble la horloĝo / nur ion petas / kaj novan gloron / ĝi profetas*. Futuron, kiun ie li volas anticipi: *En la granda pergamena libro / de la Historio / sen troa bruoj kaj sen troa vibroj / ĵus turniĝis / unu paĝo: / la ruĝa*. Nu, ankoraŭ ne estas la vico / de la blanka paĝo! Ni fizikistoj scias, ke por havigi blankan lumon sur blanka paĝo necesas adicii kolorojn: la ruĝan kaj la verdan (ambaŭ bone konataj de la transaj esperantistoj) kun la violblua (de ĉiuj nekonata). Urgas do, ke ni filozofoj identigu tiun violbluan, por ke ne realiĝu alia antaŭdiro de Piĉ, ci-foje pesimisma: *la specio antrope / ne estas eterna kaj venos alia heroo. / Komenciĝos la historio / de tute nova / Protozoo*. Prefere nia Infana Raso fine adoltegiĝu kaj skribu la blankan paĝon de la Historio.

La obseda, preskaŭ morbida paseismo de Piĉ ŝajnas iom nereala: la artaj monumentoj postlasitaj de niaj antaŭuloj ja meritas nian admiron, ties vivmaniero — tute ne. Imagu vin en la haŭto de servutulo de iu sinjoro

de la juĝo pri morto kaj vivo! Lin mem sub la tiraneco de iu absolutisma reĝo per dia rajtigo.

Sed nur malŝato de la nuno kaj sopiro al la paseo ne pravigus la titolon de la poemkolekto. La angoro, kiu ĝin tramplektas, ŝajnas esti la timo antaŭ la morto. Tiel ofte la poeto tuŝas funebrajn ideojn: en sia deziro vivi ĝis la jaro 2001, en la multaj citoj de tombo, de Ĥarono kaj Leteo, de la Eterna Silento.

Kelkaj lingvaj novaĵoj ne tro ĝenas, ĉar sufiĉe klargitaj glosare. Tamen, se eĉ la Zamenhofaj **sob** kaj **sor**, la diversaŭtoraj substituantoj al la plursignifa **de**, ne trovis imitantojn, probable la Piĉaj **ab**, **dos**, **nam**, **olim** k.a. estos kune kun li entombigitaj en la Litomiŝla Tombejo. Per sia poemaro, Piĉ, kvankam iom malgaja kaj grumblema poeto, tamen sukcesas *doni ĝojon al niaj dezertaj kaj malgajaj koroj kaj havos ion por kunporti*.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Laste aperis . . .

Fermita urbo, La, István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 128p. 21cm. ISBN 963 571 075 5. Sciencfantasta romano. Prezo: 13,80 guldenoj.

Homologo; Nektalogo pri monologoj, skeĉoj, diapozitivaj kaj filmoj, Stefan MacGill. Roterdamo: La aŭtoro, 1982. 16p. 21cm. Mimeo. Prezo: 1,20 guldenoj.

Individualisma socialismo de d-ro Axel Robertson Proschowsky el Nico (Francio), La; Félix Lagalaure. Laroque Timbaut: Cercle Espérantiste, 1982. 15p. Mimeo. Prezo: 1,20 guldenoj.

Internacia korespondo en Esperanto (1969), M. Miyamoto (1913-) kaj S. Siraisi (1907-). Tokio: Yōbunsha, 1982 (4a eldono). 110p. Ilustrita. 18cm. Gvidilo kun poŝtaj kaj transpagaj reguloj. Japanlingva. Prezo: 8,10 guldenoj.

Kialo de l'vivo, La; Racia solvo de la problemo de l'ekzistado, Léon Denis. El la franca trad. A. Soares. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1982. 47p. 18cm. Prezo: 3,00 guldenoj.

Knabo kun la aĉa vizaĝo, La. Blasien: Budhana Ligo Esperantista, 1982. 10p. Mimeo. 15cm. Rakonteto kun religia fono. Prezo: 1,50 guldenoj.

Kristanismo kaj kristana doktrino, La, A. da Silva. El la portugala trad. E. Padrao. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 31p. Mimeo. 21cm. Prezo: 1,80 guldenoj.

Penso de Epikuro, La, A. da Silva. El la portugala trad. J.J. Rodrigues. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 15p. Mimeo. 21cm. Prezo: 1,20 guldenoj.

Por la makedona lingvo. Red. T. Dimitrovski, B. Koneski, T. Stamatovski. El la makedona trad. Nikola Rašić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1982. 91p. 20cm. Artikolaro pri la plej juna el la slavaj lingvoj. Prezo: 6,00 guldenoj.

Seize règles de l'Espéranto, Les. Laroque Timbaut: Cercle Espérantiste de l'Agenais, 1982. 32p. Mimeo. 15cm. La 16 reguloj de la Fundamento prezentitaj por franglingvanoj. Prezo: 1,20 guldenoj.

Unitariismo; Skizo pri la kredoj, historio kaj organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj, Kenneth Twinn (1910-). Vlaardingen: VoKo, 1982. 22p. Mimeo. 21cm. Voĉoj kristanaj n-ro 5. Prezo: 1,80 guldenoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20%, por la mendoj super 200 guldenoj – 10%. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!



**68a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Budapeŝto (Hungario)
1983 07 30 – 08 06**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

Adreso de LKK: Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

La kongresa temo: La ĉi-jara kongresa temo ("Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado") ricevos eksterordinare profundan pritrakton dum la 68a UK. Dank' al la iniciatoj de LKK, kiuj ricevis plenan apogon de la Estraro de UEA, oni planas amason da fakaj kunsidoj por trakti diversajn, specifajn aspektojn de la temo.

Sed estas ĉi-rilate ankaŭ alia novaĵo, kiun preparas LKK: ĝia celo estas enplekti fakulojn ankaŭ el la ne-esperantista mondo. Tial oni dissendas varbilojn en kvino da lingvoj por persvadi potencialajn interesitojn partopreni en la Kongreso, pro sia faka interesiĝo pri ĝi. Laŭbezone oni planas provizi interpretadon por la ne-esperantistoj. Plie, oni intencas starigi ekspozicion de komunikiloj apoge al la temo.


Kongresa Komunikado

Scienca Eldona Centro (SEC): Kiel konate, SEC estas la budapeŝta oficejo de UEA, kies estro, prof. Haszpra (ankaŭ membro de LKK), anoncas la jenajn specialajn aranĝojn por la UK, kiujn planas SEC: 1. terminarista renkontiĝo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la evoluigo de faka terminaro; 2. kunsido de la redaktoroj de Esperantaj fakrevuoj pri la ekonomiigo kaj disvastigo de la scienca, teknika kaj popularscienca revuaro; 3. kunsido pri la evoluigo de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto.

Alia faka agado: Ĉiukongrese fakaj asocioj havas la eblecon uzi la UK kiel forumon por siaj specifaj agadoj. Ĝis nun anonciĝis IKUE, ILASE, IEI, VEK, ILEF, MEL, ILERA, INOE, ORE, MEM, EGLI, ELF-AREK, IFEF, IEKA, UMEA, KELI, ISAE. Se en tiu listo ne troviĝas la titolo de via asocio, instigu ĝian sekretariojn tuj forsendi la mendilon!

Karavanaj aliĝoj: Ankoraŭ valoras profiti de la speciala tarifo por karavanaj aliĝoj al la UK. Jam ĉiuj orienteŭropaj landaj asocioj kaj seso da ceteraj organizantoj ĝuas rabatitajn aliĝkotizojn. Se vi opinias, ke vi povos krei karavanon de minimume 25 kongresanoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la Kongreso, petu al la kongresa administracio sendi al vi la karavanan regularon.

Statistiko: Ĝis la fino de januaro aliĝis 1055 kongresanoj el 40 landoj. Al tiu cifero oni povas aldoni ĉirkaŭ 2000 anoncitojn el orienteŭropaj landoj, kies landaj asocioj ankoraŭ transpagadas la kotizojn.



La ĉi-jara kongresa urbo Budapeŝto prave fieras pri la mirinda arkitektura beleco de sia Fiŝista Citadelo.

Ĉi tiun rubrikon prizorgas: **PAUL HOPKINS, 45 Mansion Street, Kitchener, Ontario, Kanado N2H 2J5.**

39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Adreso de LKK: Pf. 139, H-1368 Budapest, Hungario.

Adreso de TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tamen al Debrecen!

Inter la apero de nia decembra numero kaj nun venis al ni eta lavango da informoj pri la 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Post la jarfina kunsido en Roterdamo de la TEJO-Estraro kaj rezulte de interkonsentoj kun la Landa Kongresa Komitato de la 39a IJK, nun estas certaj la loko, datoj kaj aliaj detaloj pri la Kongreso.

Kiel antaŭvidite, la Kongreso okazos de la 23a ĝis la 30a de julio – do en la semajno tuj antaŭ la 68a UK en Budapeŝto – en la orienthungara urbo Debrecen. Aliĝiloj estos baldaŭ haveblaj kaj dissendiĝos i.a. en *Koncize*. Tamen, por ke vi ne devu atendi pli longe la informojn pri la ĉi-jara IJK – kiu, fine, okazos post malpli ol duonjaro – jen la plej gravaj detaloj pri aliĝo kaj kotizoj:

Pro la malfrua apero de la aliĝilo, estos nur tri kotizperiodoj. La unua periodo finiĝos la 31an de marto, kaj ĝis tiam validas jenaj kotizoj: por homoj ĝis inkl. 21-jaraj: 210 gld. (2520 forintoj); 22-26-jaraj: 235 (2820); 27-33-jaraj: 275 (3300); pli aĝaj: 310 (3720). Tiuj bazaj kotizoj inkluzivas loĝigon, manĝadon, ekskurson kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj aranĝoj. Post la 31a de marto, kaj denove post la 10a de junio, ĉiuj kotizoj altiĝos. Por individuaj membroj de TEJO (t.e. tiuj kiuj ricevas minimume la Jarlibron de UEA kaj la revuon *Kontakto*) estas la kutima rabato de 30 gld. (360 forintoj). Ankaŭ eblas partopreni la Kongreson sen loĝigo kaj sen manĝoj, do kiel “memzorganto”, kaj tiel ricevi rabaton de 150 gld. (1800 forintoj). Tamen, se vi volas streĉi vian buĝeton en la alia direkto, vi povas mendi lokon en dulita hotelĉambro, por kio necesas krompagi 70 gld. aŭ 840 forintojn.

Kiel por la UK, la maniero aliĝi dependas de via loĝlando. Se vi loĝas en orienteŭropa lando, aliĝu ĉe via landa sekcio de TEJO kaj pagu al ĝi. En Hungario mem, aliĝu rekte ĉe LKK (adreso ĉi-supre) kaj petu enpagilon; la banka kontonumero de la LKK estas OTP VIII. ker 516-10005. El Rumanio skribu rekte al LKK por pliaj detaloj. Loĝantoj de aliaj landoj sendu la aliĝilon rekte al la adreso de TEJO (ĉi-supre) kaj pagu al la poŝtĉekkonto 157.22.12 de Internacia Junulara Kongreso, aŭ al la bankkonto 42.69.01.444 ĉe Amro Bank Rotterdam en la nomo de Universala Kongreso de Esperanto. Menciui “39a IJK 1983” kaj vian nomon. Se vi pagas per banko, nepre aldonu bankkoston de 6 gld. En kazo de transpagaj obstakloj konsultu vian landan sekcion de TEJO, landan kotizperanton de UEA aŭ LKK.

Roberto Haddon

Speciala kotizo por gejunuloj en la 68a UK

Multan aklamon renkontis pasintjare en Antverpeno la decido, ke la gejunuloj, kiuj partoprenis la TEJO-kongreson en Loveno, rajtas senpage aliĝi al la UK. Tiu pasintjara eksperimento (tio ĝi estis) rekonis la malfacilan situacion en kiu junaj homoj frontas la tenton partopreni du sinsekvajn kongresojn, kio plej ofte superas iliajn financajn eblojn. La senpage aliĝo almenaŭ mildigis la fincan ŝarĝon (ĉar restis ankoraŭ por pago la restadkosto dum la UK). Aliflanke, la ĝenerallaj bildoj kaj etoso de la UK grave ŝanĝiĝis, ĉar tie aperis dekoj da gejunuloj, kiuj alie ne estus aliĝintaj al la Kongreso. La gajno do estis ambaŭflanka.

Kun tia konkludo el la pasintjara UK estas kompreneble, ke UEA kaj la budapeŝta LKK tre serioze konsideris la eblojn ripeti la eksperimenton ankaŭ dum la 68a UK en Hungario. Tamen, pro la supozo, ke ambaŭ kongresoj en Hungario estos almenaŭ duoble pli grandaj ol tiuj en Belgio, montriĝis, ke ne eblas ripeti la pasintjaran solvon. Tial oni venis al jena kompromiso:

Ĉiuj aliĝintoj al la 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Debrecen, kiuj estas malpli ol 26-jaraj, rajtas aliĝi al la 68a UK pagante la specialan kotizon de nur 42,00 guldenoj (aŭ 500 forintoj).

Ekde 1983 *Kontakto* estas nova revuo, por homoj junaj en la vivo kaj novaj en la Movado. Novaj kaj modernaj temoj per facila, klara lingvo. Pli ofte, pli dapaĝoj — sed la prezo sama!

● **Bulgario:** Laŭ *Bulgara esperantisto*, dum la pasinta jaro la Internacian Lingvon lernis 1600 personoj en centoj da kursoj en tiu lando. 28 el tiuj kursoj okazis en mezlernejoj, kie Esperanton lernis ĉ. 640 gelernantoj.

● **Portugaliao:** En la pasinta jaro Portugala Esperanto-Asocio ricevis 77 novajn membrojn, tiel ke ĝia anaro nun konsistas el 335 personoj. Tio estas aparte grava rezulto, se oni memoras, ke post pluraj jardekoj da malfavora politika klimato por Esperanto en tiu lando, PEA fondiĝis nur antaŭ deko da jaroj (en 1972). En la 20aj kaj 30aj jaroj de la jarcento, la Movado en Portugaliao estis aparte vigla kaj notis plurajn publikajn rekonojn. Ankaŭ tiutempe ekzistis kaj aktivis dum mallonga periodo Portugala Esperanto-Asocio (fondita en 1924).

● **Jugoslavio:** En Serbio, la plej granda jugoslava respubliko, pasintjare oni renovigis la decidon pri la lerneja instruado de


Esperanto. Laŭ tiu nova decido de la koncernaj lernejoj aŭtoritatoj, la Internacia Lingvo povas nun fariĝi fakultativa studobjekto en ĉiuj lernejoj, kie ekzistas kvalifikita pedagogo por instrui Esperanton. Tiurilate ĵus aperis ampleksa 40-leciona lernolibro de la Internacia Lingvo. La libron verkis prof. d-ro B. Popović kaj R. Trifunjačić. La nova lernilo aperis kiel eldonaĵo de "Prosvetni pregled", la ĉefa pedagogia periodaĵo en Serbio.

● **Ruando:** Tiu malgranda lando (ĉ. 5 milionoj da loĝantoj) meze de la orienta Afriko, inter Zairio kaj Tanzanio, ne menciigis ĝis nun en la Movado, ĉar ĝi ne havis esperantistojn. Ekde la fino de novembro 1982, en la ĉefurbo Kingali restadas ferie Edward Symoens, komitatano de UEA kaj prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo (Belgio). S-ro Symoens jam faris plurajn prelegojn pri Esperanto kaj kolektis grandan nombron da interesitoj en Ruando. Pluraj el ili nun eklernas la Internacian Lingvon per koresponda

kurso. Symoens restos en Ruando ĝis la fino de februaro kaj li havas planojn pri pliaj prelegoj kaj rapidaj kursoj de Esperanto.

● **Svislando:** En 20 diversaj aranĝoj, organizitaj dum 1982 fare de Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds, partoprenis 241 personoj. La plej grandan nombron da partoprenantoj (84) logis kvin feriaj renkontiĝoj (por skiantoj, infanoj, familioj) kaj ses kulturaj semajnfinoj, al kiuj venis 82 personoj. Kvar diversgradajn kursojn de KCE ĉeestis 45 lernemuloj, dum al kvin aranĝoj de Internacia FERIA Altlernejo venis entute 30 personoj.

● **Japanio:** La Libroservo de Japana Esperanto-Instituto vendas jare Esperantajn librojn por pli ol dek milionoj da enoj (pli ol 10 000 gld.). Tio certe faras ĝin unu el la plej grandaj movadaj librovendejoj. La Libroservo de UEA, kiu sendube estas la plej granda movada vendejo enspezas jare ĉ. 170 000 gld. Se ni aldonas, ke en Japanio funkcias ankaŭ aliaj libroservoj, oni konstatas, ke tiu lando estas la plej granda konsumanto de E-libroj.



● **Hungario:** La 30an de decembro 1982, en la kadro de la Budapeŝta Vintra Esperanto-Ferio, antaŭ multnombra internacia publiko, la geaktoroj de la Budapeŝta Esperanto-Teatro prezentis riĉan silvestran programon en Esperanto. En la spektaklo, kiu konsistis el skeĉoj, anekdotoj, kanzonoj, partoprenis jam bone konataj al la Esperanto-publiko geaktoroj: Ildikó Pécsi, Zsuzsa Szilagyi, Emil Keres, István Wollmuth kaj Kálmán Szabó. Reĝisoris Kálmán Szabó. Sur la fotoj: Kálmán Szabó (maldekstre) gvidas la programon, kaj Zsuzsa Szilagyi kantas Esperanto-kanzonojn. – La fotojn faris: Jakab Regős.

Fake

● **Instruado:** La lerneja instruado de la Internacia Lingvo havas nuntempe la plej firman bazon en Hungario. Tie Esperanto estas elektebla kiel la tria fremda lingvo en ĉiuj mezlernejoj kaj — tio faras Hungaron unika sur ĉi tiu kampo — en la lando ekzistas sistema kaj oficiala edukado de la instruistoj de Esperanto. Nun aldoniĝas plia detalo: la Ministerio pri Edukado ĵus nomis apartan personon por oficiale inspekti la lernejan instruadon de Esperanto tra la lando. Tiu tutlanda inspektoro fariĝis s-ino Zsuzsa Barcsay, internacie konata ankaŭ pro la realigo de "La Tago de la Lernejo" dum la Kongreso en Antverpeno, kie lanĉiĝis ankaŭ libro redaktita de ŝi (*Metodiko en la praktiko*, 14,70 gld).

● **Ĵurnalismo:** Memore al sia forpasinta aktivulo Ivan Flanjak (1950-1982), loka Esperanto-societo en Osijek (Jugoslavio) organizas de la 18a ĝis la 20a de marto ĉi-jare internacian kunvenon pri la temo: "Ĵurnalismo kaj literatura kreado en Esperanto". La organizantoj ĝuas apogon de la loka radio kaj komunumaj aŭtoritatoj. Adreso: Esperanto-Societo, P.p. 27, YU-54000 Osijek, Jugoslavio.

● **Radio:** Laŭ la regula jara statistiko de s-ro Georges Larglantier, redaktoro de nia radiorubriko, en 1982 la Esperantaj radioprogramoj statis jene: dek stacioj en ok landoj disaŭdigis entute 3 623 Esperanto-programojn, kiuj daŭris 1 555 horojn. Kompreneble, la plej multajn elsendojn havis Radio Pekino (1 460 programoj dum 730 horoj) kaj Pola Radio (1 383 programoj dum 630,45 horoj); sekvas Radio Berno (312 programoj), Radio Vieno (156), Radio Vatikano (104) ktp. Por komparo, en 1981 okazis 3 439 programoj dum 1 497 horoj (tio ĉi estas korekto de la ĉi-rilataj nombroj aperintaj en nia n-ro de marto 1982, p. 58).


● **Interlingvistiko:** En la Fakultato pri Filozofio kaj Literaturo de la Universitato en Lieĝo (Belgio) antaŭ nelonge diplomiĝis f-ino Huguette Tholet. La temo de ŝia diplomlaboro estis: "Evoluproblemoj de la artefaritaj lingvoj; Esperanto". En la 150-paĝa franclingva manuskripto (kies ekzempleron ricevis la Biblioteko Hodler de UEA) du trionoj de la teksto estas dediĉitaj al Esperanto, kun aparta atento al la evoluo de la scienca terminologio en la Internacia Lingvo.

● **Medicinistoj:** Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), fondita en 1908 kaj aliĝinta al UEA, ekde 1973 ĉi-jare aljuĝas UMEA-Premion por la plej elstara medicina esplorklaboro publikigita en Esperanto. En 1982 la premion gajnis d-ro Saburo Yamazoe, ĝenerala sekretario de UMEA. La fondinto de la premio, d-ro Hideo Shinoda, honora prezidanto

de UMEA kaj honora membro de UEA, antaŭ nelonge, per nova donaco al la premia fondaĵo, duobligis la financon bazon de la premio. Tiu kapitalo nun konsistas el 10 milionoj da enoj (laŭ la nuna kurzo ĉ. 100 000 guldenoj) kaj ĝi sendube estas la plej granda premia kapitalo en la Esperanto-movado.

● **Universitatoj:** Laŭ la revuo *La espero el Koreujo*, en 1982 en Korea Respubliko funkciis 12 studentaj Esperanto-grupoj kun entute 296 membroj.

Persone



● **Savir:** Internacie konata Cseh-metoda Esperanto-instruisto Moŝe Savir denove aktivas por Esperanto kaj gvidas kursojn en popola universitato kaj eksperimenta gimnazio en Israelo. Lia filatela ekspozicio (vidu la foton), pri arto, scienco, sporto kaj tekniko sur poŝtmarkoj, vizitis jam pli ol cent kulturajn centrojn, lernejojn kaj bibliotekojn en Israelo. Savir lernis Esperanton en 1932, en Vilno (Litovio), gvidis Cseh-metodajn Esperanto-kursojn en Francio, Danlando kaj Finnlando. Antaŭ du jardekoj, Savir laboris kiel elektro-inĝeniero en la afrika lando Malio, kie li instruis ankaŭ Esperanton.

Esperanto en radio

La kompleta tabelo aperis en nia numero de decembro 1982, p. 220. Informojn pri Esperanto en radio sendu al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bd. Murat, F-75016 Paris, Francio.

RADIO VIENO ne plu disaŭdigas sian programon sabate, sed nur dimanĉe per ŝanĝitaj ondolongoj:

05.45 – 05.57: 50.46 m (5945 kHz), 48.74 m (6155 kHz), 16.91 (17745 kHz).

09.45 – 09.57: 48.74 m (6155 kHz), 30.71 m (9770 kHz), 41.84 m (7170 kHz).

La indikitaj horoj estas, kiel kutime,

laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

Se vi aŭskultas la radioprogramojn en Esperanto, ne forgesu de tempo al tempo skribi al koncernaj radiostacioj, kiuj ĉiam interesiĝas ne nur pri kvalito de la ricevo sed ankaŭ pri tio kion vi opinias pri la kvalito de la programo. La adresojn vi trovas en la decembra numero.

EL KELKAJ MILOJ RESTAS NUR KELKAJ CENTOJ

Malgraŭ la alta prezo, nun pli ol 2 300 esperantistoj jam posedas ĉi tiun unik-
kan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj
epitetis ĝin jene: monumenta verkego
(Waringhien), maksimuma kompleteco
(Benczik), senprecedenca entrepreno
(Régulo), giganta trezoro (Blanke), epo-
peo (Pool), miraklo de precizeco (Boul-
ton), grandioza (Kurusu), treege valora
volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano
(Wells). Estas tempo zorgi, ke oni trovi-
ĝu en la lastaj centoj de la posedontoj!

esperanto^{en}
perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.)
kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974.
876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-
paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por
Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

Oficiale informilo

KOTIZOJ SAMAJ ĜIS MARTO

En la kotiztabelo por 1983 (nia okto-
bra numero) estis dirite, ke la anonc-
itaj kotizoj por Argentino, Brazilo,
Israelo kaj Meksikio validos nur ĝis la
fino de 1982. Tamen, tiuj kotizoj
validos ĝis la fino de marto 1983.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Norvegio: Kjell Peder Hoff.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Aŭstralio: Tim A. Einihovici; Ilija Grahov-
vac; L.V. Scott; Margaret Mary Chalde-
cott. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: G.
Wolff; Jules Verstraeten. Brazilo: Denise
A. Deslandes; Elvira Fontes; José Dias
Pinto; Alvaro Rabêlo; A. de Souza Bar-
bosa; Wilson Deslandes. Britio: John
Brownlee; Kenneth A. Sly. Danlando:
Ejnar Hansen; P.O.P. Andersen. Finn-

lando: Aarne Ratalahti; Hillevi Artikari;
Touko Tähtinen; Veikko Tikkanen;
Vuokko Tellervo Heinäsuo. FR Germa-
nio: Louis Beaucaire; Bruno Vogelmann;
Ellen Eggers; Elise J.F. Woller; Erdmann
Fritsch; Martin Gründler; Heinz Schin-
dler; Helene Hiebel; Hans Schütt; Hel-
mut Welger; Julie Winter; Helmut Klün-
der; Richard Schulz; M. von Waldowski.
Francio: Eija-Liisa Chevalier; Gaston
Waringhien; Jean Lezan; Odette Bernet;
Roland Jossinet. Italio: Clara Gubbioli
Carioli; Michele Mariano. Japanio: Wil-
helm Schmid; Syozi Hosonuma; Takasi
Ôhara. Jugoslavio: Petar Fjodorov;
Jožica Židanik; Neven Kovačić. Kanado:
Dorothy M. Hawley; Edward William
Woodruff; W.G. Du Temple; Martha W.
Evans; Betty Salt; Wilfred Settle. Korea
Resp.: Ĉungsik Ĵang. Luksemburgo:
Brian R. Moon. Nederlando: Evert J.
Woessink; Elly Kervers-van Tholen;

Gerard Peet; H.M. Butter; Jenneke Dun-
newold-Ehrmann; Louise Adelaar; H.C.
Luyke; Truus Mantingh; Akiko Ŭusink-
Nagata; Simon P. Smits; W.A. Verloren
van Themaat; W.C. Keizer; W. Roden-
huis; Gerda H.M. Wulfers-Meddens;
C.B. Zondervan. Norvegio: Kjell Gusta-
vsen; Ludwig Anjer; Margrete Land-
mark. Nov-Zelando: D.J. Langman. Sve-
dio: Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Bror
Lindström; Edla Nilsson; Elly Persson;
Erik Carlén; Gustav Nygård; Karl E. Gus-
tafsson; Harald Andersson; Henrik Karl-
sson; Jim Hornö; Jan-Olof Svensson; Karl
G. Lennart Lagerkrantz; Leif Holmund;
Olle Olsson; Olle Persson; Ragnar
Hjorth; Sven Sundin; Tore Johansson.
Usono: Charles R.L. Power; Daniel L.
Mason; Ĝiĝi Harabaĝiu; Humphrey Ton-
kin; Ken Thomson; Lucille C. Harmon;
Margaret L. Barkley; Moshe Lewin; Mar-
tha A. Walker; James Parkerson; Pauline
Ledeen; Robert A. Swenson; William
Solzbacher; Mark Starr; William H.
Schulze. Japanio: Kôzô Ueda (for-
pasinta).

LA ALTERNATIVO:

MONATO

internacia magazino sendependa
pri politiko, ekonomio kaj kulturo

40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Petu provekzempleron ĉe:

TK/STAFETO, Miksebaan 65A,
B-2130 Brasschaat, Belgio

kontraŭ du internaciaj respondkuponoj.



DONACOJ 1982 (Gld.)

ĝis la 31a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 101,54. Japanio: Ziro Nagaoka 54,50. Svedio: Jarl Hammarberg 10,00. Div. malgrandaj: 8,39. Sumo por 1982: 3 936,90.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: Stella de Weerd 29,09. FR Germanio: Elise Woller 77,09. Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00. Sumo por 1982: 4 974,58.

FONDAĴO CED: Sumo por 1982: 140,80.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: H. Böcker 24,46. Nederlando: E.J. Woessink 2 610,85; E.M. Maasbommel 100,00; G. Ellerman 17,22; O. Hoekstra 500,00. Div. malgrandaj: 8,85. Sumo por 1982: 8 349,66.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Sumo por 1982: 272,70.

ASOCIA KAPITALO: Sumo por 1982: 12 041,20.

FONDAĴO KER DE TEJO: Sumo por 1982: 24 377,84.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA: **Patronoj** (minimumo \$ 100): Francio: Henri Roy; R. Volpelière. Kanado: Charles Carson. Usono: H. Tonkin; Joan E. Gildemeister; Lucille N. Thompson; Rochelle F. Grossman; Mary kaj Conn Murray; Robert A. Swenson; Jacqueline Reynolds; Eugene H. Thompson; Elwin Reed; Mack X. Dougherty; Julius Manson. **Subtenantoj** (minimumo \$ 25): Belgio: Stella de Weerd; E-ista Brusela Grupo. Francio: Fernand Charennat; Pierre Guérout; Esperantaj Francaj Eldonoj; A. Levasseur; P. Cugny; P. Poly; Andrée Amice; Renée Mauchien; Raymond Despujols. FR Germanio: Hans Georg Strauss. Japanio: Setsuko Yamakawa; Syuiti Yamakawa. Kanado: W.D.B. Hackett; Pierre Collinge. Nov-Zelando: Mora Dodds. Usono: Joan Feingold; Lura R. Chapman; Rouvan Lubow; Mason N. Crook; Cleo J. Fort; Horace B. Hand; John Futran; Ken Thomson; William J. Mets. **Amikoj** (minimumo \$ 10): Aŭstralio: E.C. Thomas. Belgio: J. Thibé; E-Grupo Verviers. Francio: Marcel Pruvost; Erica Dietz; R. Despiney; Marie A. Eyssautier; C. Paganel; Fernand Boyet; Georges Prévot; Jena-Luc Tortel; Jean-Paul Beau; Louise Lemaire; J. Vincent; René Lemaire; Marguerite Rey-

naud. Kanado: Crawford Baker; Harry J. Lewis. Usono: Donna Stitz; Sigmund Klimowicz; Pearl Wegher; Jack Lesh; Rudolph Couppez; Phillip Driscoll; Vivi Couppez; Jozefo Hackenberg.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. Ouddeken 27,70; J. v.d. Teems 10,00. Sumo por 1982: 162,02.

PATRONOJ DE TEJO 1983: 1 J. Wilson, Nov-Zelando. 2 W.P. Roelofs, Nederlando. 3. E. Burg, Nederlando. 4. A. Figheira, Hispanio. 5 J. Tilleman, Israelo. 6 J. Murjan, Israelo. 7 J. Rabino, Israelo. 8 R. Vetter, Nederlando. 9. W.L. v. Leeuwen, Nederlando. 10 Ineke Emmelkamp, Nederlando. 11 L. Anjer, Norvegio. 12 P. Zlatnar, Jugoslavio. 13 D.J. Langman, Nov-Zelando. 14 R.-J. Marmou, Francio. 15 Henk Schippers, Nederlando. 16 J.S. Douma, Nederlando. 17 Claude Piron, Svislando. 18 Günther Becker, FR Germanio. 19 B. Muizelaar-Borger, Nederlando. 20 Conny Ch. M. Tan, Nederlan-

do. 21 Jenny Heetkamp-Senstius, Nederlando. 22 Stella de Weerd, Belgio. 23 Ĝiĝi Harabaĝiu, Usono. 24 Bun'iti Isizaki, Japanio. 25 Sirô Koga, Japanio. 26 Frank E. Swift, Nov-Zelando. 27 Anne-Marie Brisot, Francio. 28 Errol Chick, Aŭstralio. 29 A. de Souza Barbosa, Brazilo. 30 Margrete Landmark, Norvegio.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Sumo por 1982: 100,00

FONDAĴO TEJO: Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00; O. Hoekstra 500,00. Div. malgrandaj 10,28. Sumo por 1982: 816,50.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): Sumo por 1982: 4 951,80

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Sumo por 1982: 404,78.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). *Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

62-jara esperantisto serĉas korespondantojn el Soveta Unio: s-ro Gerrit Nieuwenhuis, Irenestraat 11, 6707 CT Wageningen, Nederlando.

Junulo 24-jara deziras korespondi kun gejunuloj de ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj: Antonello Airo, via Marcantonio Della Torre 2/5, I-37131 Verona, Italio.

Lerni paroli Esperanto-lingve per la sukcesaj *Facilaj dialogoj!* Aŭfrankite: 29 francaj frankoj. Ligue "Pro UNESCO", 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Serĉas esperantistojn en Honduraso, Panamo, Jamaiko, Haitio, Dominika Respubliko, Paragvajo: Brazilia Esperantista Junulara Organizo: Caixa Postal 11-1110, BR-70084 Brasília DF, Brazilo.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instru-

hora kabareto lernigas **esperante kaj germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Miaj gekursanoj — plenkreskuloj — deziras korespondi: Franciska Harmsen, Rinka 25, SU-229705 Liepaja, Soveta Unio.

Tutmonde korespondi deziras 10 geesperantistoj: F-ino Correy, 10 rue des Courtils, F-25000 Besançon, Francio.

33-jara elektroteknikisto deziras korespondi tutmonde: s-ro Abdo Kassem Abdulla, P.O. Box 5318. Maala – Aden, P.D.R. Jemeno.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Okaze de la Monda Komunika Jaro, bonvolu sendi poŝtkartojn por nia aprila leter-vespero. Ni respondos al ĉiuj: Essonne-Esperanto, Renaissance et Culture, Centre Commercial St. Hubert, F-91700 Sainte-Geneviève, Francio.

Guido Gezelle

Unika poezia figuro en la pasintjarcentaj Flandrujo kaj Nederlando, Gezelle estas la plej fama flandra lirikisto de la 19a jarcento. Luksa, grandformata, bele ilustrita poemkolekto, kun originaloj kaj tradukoj en 12 lingvojn, inter kiuj ankaŭ Esperanto. **Mendu rekte ĉe: Eldonejo & Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio, aŭ ĉe la Libroservo de UEA.**

Guido Gezelle (1830-1899). Red. B. Peleman. Antwerpen: Orteliussfonds-Uitgeverij MIM, 1980. 112p. Ilus. 31cm. Bind. Plurlingva. Prezo: 890,00 belgaj frankoj, plus sendokostoj. **Unika libro de unika poeto!**

Audrey Childs-Mee

Saluton!

Esperanto aŭtodidakte

Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo

Jen tutnova Esperanta lernolibro por komencantoj. Ĝi estas verkita laŭ la principoj de rektmetoda lingvoinstruado kaj ĝi kontentigas precipe la bezonojn de meminstruantoj, sed ĝi samtempe taŭgas ankaŭ por lernado kun kursgvidanto. Tiucele fine de la libro troviĝas skizaj indeksoj.

La lernolibro estas plenplena de trafaj ilustraĵoj, kiuj klare bildigas ĉiun lernotan lingvaĵon kaj certigas tujan komprenon de la prezentata koncepto. En la ŝlosilo (kun respondoj al ekzercoj) troviĝas ankaŭ utila tabelo "Esperanto-sonoj en kelkaj naciaj lingvoj".

240 paĝoj presitaj sur tre fortika papero, kolora kovrilo. Prezo nur: GM 19,85; Gld. 22; £5,60; FF 60; US\$8,50 aŭ Bfr. 420, plus 10% por la sendokostoj. Aĉetu tuj 3 ekzemplerojn, kaj pagu nur 2. Mendu ĉe la eldonejo: TK/Stafeto, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribuanto: Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.

LA CENTRA OFICEJO DE UEA SERĈAS PLI DA OFICIST(IN)OJ

UEA serĉas novajn oficist(in)ojn por sia Centra Oficejo en Roterdamo. Temas parte pri transpreno de jam ekzistantaj taskoj, sed parte ankaŭ pri plivastigo de la profesia agado sur novaj kampoj. Jen konciza priskribo de la oficoj:

Ĝenerala direktor(in)o

Taskoj: Superrigardo kaj gvido de la tutaj administrado kaj financo de la Asocio kaj kunordigo de ĝiaj oficejoj (nuntempe: Roterdamo, Antverpeno, Nov-Jorko kaj Budapeŝto). [La nuna Ĝenerala Direktoro forlasos tiun oficon en majo.]

Kvalifikoj: Sperto unuavice pri oficeja administrado, duavice pri la Esperanto-movado; matura, reprezenta kaj diplomatia personeco.

Eldonredaktist(in)o

Taskoj: Evoluigo de la eldona agado; pritrakto de manuskriptoj, eldonkontraktoj, pres-ofertoj ktp; helpo al (kaj laŭbezzone anstataŭado de) la redaktoroj de la asociaj periodaĵoj kaj de la administranto de la Libroservo.

Kvalifikoj: Sperto pri eldonado kaj redaktado; unuaranga lingva nivelo en Esperanto kaj laŭeble en aliaj lingvoj; komercaj interesoj kaj kompreno pri la Esperanta eldon-merkato. Por tiu ĉi ofico estas eventuale konsiderebla laboro en la Grafika Centro Antverpeno anstataŭ la C.O.

Oficist(in)o por turismo

Taskoj: Evoluigo de turismaj servoj (grupvojaĝoj, vojaĝinformoj, ĉirkaŭkongresaj aranĝoj k.s.); kunlaboro en la administrado de la Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso.

Kvalifikoj: Atestebla kapablo pri turisma komerco; aktiva scipovo de kelkaj naciaj lingvoj; matura, iniciatema personeco.

Kontist(in)o

Taskoj: Helpo al (kaj laŭbezzone anstataŭado de) la nuna (parttempa) kontistino; aliaj taskoj laŭ kvalifikoj kaj interkonsento.

Kvalifikoj: Sperto pri kontumado, laŭeble ankaŭ pri valutoj kaj bilancoj; precizeco kaj kunlaboremo. Por ĉi tiu ofico estas konsiderebla ankaŭ parttempa laboro.

Sekretari(in)o

Taskoj: Ĝenerala administra laboro; korespondado; helpo en aliaj fakoj laŭbezzone.

Kvalifikoj: Bona lingva nivelo en Esperanto; rapida tajpkapablo; ordemo kaj kapablo labori memstare.

Por ĉiuj ĉi oficoj eblas ankaŭ ia rekombino de la priskribitaj taskoj, depende de la kvalifikoj kaj interesoj de la kandidatoj. La salajroj de la C.O. nuntempe troviĝas inter 2000 kaj 3100 gld. monate malnete (+ ekstraĵoj) por tuttagaj oficoj. La salajro-nivelo por la anoncitaj oficoj dependos de la sperto kaj kvalifikoj. Se vi interesiĝas, petu demandaron de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ informiĝu telefone: (010) 361539.

en kastelo

GRESILLON

de la 3a de aprilo
ĝis la 9a de aprilo 1983

**RENKONTO de
INFANOJ**

kursoj, fabrikado de
ĵurnalo, lumbildoj, skeĉoj
marionetoj

**PEDAGOGIA
SEMINARIO**

prelegoj kaj debatoj pri
kursfarado

informoj: esperantista kulturdomo
49150 BAUGE FRANCIO

Eldonejo -librejo SONORILO

L'espéranto dans l'enseignement, d-ro Pol Denoël. Ĵus aperis la dua eldono! 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado. Prezo: 100 Bfr.

Initiation théorique et pratique, d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 180 Bfr.

Gluafiŝo: Internacia lingvo Esperanto: Ĵus aperis! Formato 16,6 x 7cm. Prezo: 25 Bfr.

Kartoj por la Nova Jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj). Prezo: 60 Bfr.

Eldonejo-Librejo SONORILO estas peranto i.a. de: *Heroldo de Esperanto* (Bfr.520); *El popola Ĉinio* (1 jaro: Bfr.180, 2 jaroj: Bfr.300, 3 jaroj: Bfr.420); *Monato* (Bfr.960).

Librejo SONORILO vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato! Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 100 gld. – 20%, por la mendoj super 100 gld. – 10%. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima libroservo, aŭ rekte ĉe: Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 63 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 15,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,32 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska